



ESPERANTO

M A J O 1 9 6 2

55a Jaro - N-ro 678 (5)

esperanto

M A J O 1962

55 a J A R O

REVUO INTERNACIA

N-RO 678 - (5)

Fondinto : H. HODLER

Cion por la redakcio oni sendu al la Redaktoro :
W. Auld, 35 Deer Park, Sauchie, Alloa, (Clackmannan-
shire), Skotlando.

Cion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto
(abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA
ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, Rotter-
dam-2, Nederlando, Telefono : (010) 32788. Ĝirkonto: 378964
TELEGRAMADRESO : ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi respektive
la redakcion aŭ la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ
la 1-a de la antaŭa monato.

Bankisto de U.E.A. :

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-1.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesitaj,
kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represafon
al nia redakcio.

Jara abono (1962) : 11,50 gld. (kun membreco kaj jarlibro
15,— gld.). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo 128,— gld, 1/2 paĝo 64,— gld, 1/4 paĝo 32,— gld,
1/8 paĝo 16,— gld, 1/16 paĝo 8,— gld.

Anoncetoj pri korespondado :

0,15 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu
duo da vortoj.

Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la
respondeco de la Redakcio.

Legantoj en pli ol 80 landoj.

Estrarar de U.E.A. :

H. W. Holmes, O.B.E., vic-prezidanto kaj aganta prezi-
danto, 38, Fillebrook Road, London E 11, Britujo.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77, Grasmere
Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

Prof. D-ro Hideo Yagi, vic-prezidanto, 76 Kawaramachi,
Okayama, Japanujo.

E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47,
Arnhem, Nederlando.

Norman R. Smith, estrarano pri kulturaj aferoj, 75 South
Ealing Road, South Ealing, London W 5, Britujo.

D-ro W. Herrmann, estrarano pri eŭropa lingvo-kampanjo,
Bürstädterstr. 3, (16) Lampertheim-Hessen, Germanujo.

A. Rajski, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Odyńca
3/5, Warszawa, Pollando.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo,
Telefono : ARNold 90-81.

Serva Centro: ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7, Zürich 6/57,
Svislando.

LA FRONTPAĜA BILDO :

La nova domo de UEA : Nieuwe Binnenweg 176,
Rotterdam-2, Nederlando.

Enhavo

La unua kunsido de la Estraro en	
la nova domo de UEA	81
Solena inaŭguro de la nova domo de UEA	82
"La eta ĉarma land' vokas !"	85
La 47a U.K. atendas vin !	86
Pri la gepatroj de G. S. Titov	88
Internacia ekzameno	90

Rubrikoj

La Juna Vivo	89
La internaciaj konkursoj	90
Ŝaka rubriko	90
Ricevitaj libroj	91
La Lingva Ĥaoso	91
Novaj libroj	93
Tra la mondo	96
Esperantista vivo & Nekrologo	97
47a U.K.	97
Oficiala informilo	98

Manuskriptoj por "Esperanto" estu liveritaj al la
redakcio en du ekzempleroj. Ili devas esti klare
tajpitaj en korekta Esperanto. Oni skribu sur nur
unu flanko de la papero (prefere en normformato
A4), kun interlinia spaco kaj kun tre larĝa margeno
maldekstre por redakciaj instrukcioj al la presisto.
Supersignitaj literoj devas havi la ĝustajn super-
signojn, se necese permane aldonitajn. Neuzotajn
manuskriptojn oni resendas nur kontraŭ afranko
aŭ respondkupono.

OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O.)

LA UNUA KUNSIDO DE LA ESTRARO EN LA NOVA DOMO DE U.E.A.

Por la ĉi-jara printempa kunsido de la Estraro kelkaj estraranoj alvenis en Rotterdam jam merkredon aŭ ĵaŭdon frumatene por povi partopreni gravan eventon: la inaŭguron de la ĵus aĉetita kaj bonege aranĝita Domo de U.E.A.

La kunsidoj mem komenciĝis ĵaŭdon, la 12-an de aprilo kaj daŭris kun mallongaj interrompoj ĝis dimanĉo je la dua horo matene. Ĉeestis ĉiuj estraranoj, kun la escepto de Prof. Hideo Yagi, kiu pro la granda distanco ne povis alveni. La tagordo ampleksis 38 erojn, el kiuj la plejparto konsistis el pluraj punktoj. La tuta pli ol abunda tagordo povis esti pritraktita en 25 horoj da efektiva laboro dank' al pacienca gvidado de la kunsidoj fare de la vic-prezidanto kaj aganta prezidanto S-ro H. W. Holmes. La direktorino de la C.O., F-ino M. H. Vermaas kaj la redaktoro, kiuj ĉeestis la diskutojn dum la tuta tempo, kaj la K.K.S., S-ro G. Pompilio, kiu partoprenis la punktojn U.K., kontribuis al atingo de la decidoj.

Apenaŭ necesas diri, ke la Estraron inspiris la fakto, ke la kunsidoj okazis en la nova Domo, en vere favoraj kondiĉoj. La pritrakto de la financa raportaro montris, ke la duan fojon en la tuta historio de U.E.A., la Asocio finis la financon jaron sen defcito. La nombro de la membroj denove iom kreskis, kvankam parto de la membraro de la antaŭa jaro ne renovigis sian membrecon. La Estraro atente traktis tiun negativan fenomenon, komunan al ĉiuj organizaĵoj, kaj faris plurajn decidojn kiuj celas ankoraŭ altigi la nombron de la individuaj membroj. La Estraro ankaŭ ĉi-maniere petas ĉiujn ĉefdelegitojn, perantojn kaj delegitojn vaste diskonigi la celojn kaj laboron de U.E.A. inter la esperantistaro, kaj varbi kiel eble plej multajn individuajn membrojn. La Estraro publike dankas al ĉiuj kontribuintoj al la diversaj fondaĵoj, tute speciale al la Fondaĵo-Domo por "Ĉambroj" en la Domo.

La Estraro konstatis, ke la revuo "Esperanto" kontentigas la bezonojn, kaj devus troviĝi en la manoj de ĉiuj esperantistoj. Pro la translokiĝo de la oficejo kaj la ordigo de la nova domo, la publikigo de la Jarlibro prokrastiĝis, sed verŝajne ĝi povos aperi ĝis la fino de junio. Post atenta konsidero la Estraro decidis, ke U.E.A. publikigu ekde aŭtuno 1962 regule kvaronjare ĝenerale kulturan revuon. La redaktoro estos W. Auld. Estas menciinde, ke U.E.A. eldonos en la serio "Oriento-Okcidento" la verkon "Naŭzo" de J. P. Sartre en la traduko de R. Bernard.

La preparlaboroj por la U.K. en Kopenhago kontentige progresas. Oni atendas multajn novajn aliĝojn en la sekvantaj semajnoj. La Estraro aprobis la programon de la I.S.U., kies ĉeftemo ĉi-foje estos la lingva problemo en la scienco, ĝi faris definitivon decidon, ke la U.K. 1964 okazu en Hago. Ĝi ankaŭ decidis, ke, en la kadro de la U.K. 1963 en Sofio, okazu la Dua Internacia Arta Festivalo.

Multan tempon okupis la demando de informado. Specialan atenton la Estraro dediĉis al agado en Afriko en ligo kun la "Karavano de Amikeco", gvidata de Lic. T. Sekelj, kaj al disvastigo de la lingvo en Azio, aparte okaze de la Olimpiaj Ludoj en Tokio. La vic-prezidanto, Prof. Yagi, en kunlaboro kun la Japana Esperanto-Instituto, klopodos realigi la sugestojn de la Estraro. La broŝuro "Esperanto — Lingvo por Afriko..." baldaŭ aperos en 5000 ekzempleroj en la angla kaj 5000 en la franca lingvoj. Parto de la publikaĵo estos senpage disponigita al S-ro Sekelj, dum la cetera parto estos vendata je la kostoprezo al la landaj asocioj, lokaj grupoj kaj unuopuloj por agado en universitatoj kun studentoj el afrikaj landoj. La Estraro elektis la projekton de S-ro Moskala kiel plej taŭgan por informa afiŝo pri la Internacia Lingvo kaj ĝi decidis presigi la afiŝon en 5000 ekz. de granda formato kaj 10.000 de malgranda. La ideo estas, ke la afiŝo estu vaste uzata ĉie tra la mondo. Ĝi havas konvenan spacon por mallongaj nacilingvaj tekstoj.

La eksteraj rilatoj de la Asocio plue vastiĝis kaj la rilatoj kun UNESKO plifirmiĝis. U.E.A., kiel organizaĵo en konsultaj rilatoj de kategorio B, ĵus ricevis subvencion por eldono en la Internacia Lingvo de la verketo de UNESKO "Oriento-Okcidento". Ĝi aperos en tiu ĉi jaro. D-ro Herrmann, kiel komisiito por eŭropaj aferoj, raportis pri sia agado, tute speciale pri la Konferenco de la Ministroj de Edukado en Romo, al kiu U.E.A. rekte kaj la eŭropaj landaj asocioj pere de siaj ministerioj de edukado prezentos Memorandon.

La Estraro konsideris punkton post punkto la projekton de la Dua Laborplano de U.E.A., dankis al la ĝenerala sekretario pri la farita laboro kaj decidis prezenti la projekton al la Komitato en Kopenhago. Same tiel la Estraro trastudis la ampleksan Raporton pri la Agado de U.E.A. en 1961-1962 kaj, farinte en ĝi malgrandajn kompletigojn, decidis prezenti ĝin al la Komitato por akcepto.

Okaze de la 10-jara datreveno de la fondiĝo de C.E.D. la Estraro esprimis gratulon al la direktoro kaj kunlaborantoj de tiu institucio. Estis pritrakitaj pluraj aliaj demandoj.

Fine de la kunsidoj estis unuanime akceptita jena

REZOLUCIO

"En ligo kun la diskuto pri la pasivaj participoj la Estraro de U.E.A. atentigas, ke konforme al la artikolo 5 de la Statuto la oficiala lingvo de la Asocio estas la Zamenhofa Esperanto. Sekve, la Estraro deklaras, ke U.E.A. uzas kaj disvastigas la lingvon Esperanto sole en tiu formo, en kiu D-ro L. L. Zamenhof difinis ĝin en la Gramatiko kaj Ekzercaro de la Fundamento, en kiu li mem uzis ĝin en sia verkaro kaj kiun li, kiel sendube la plej kompetenta, ankaŭ eksplicite plurfoje eksplikis."

I. L.

SOLENA INAŬGURO DE LA NOVA DOMO DE U.E.A.

„Rezulto de internacia laboro: materia bazo por
plua disvastigo de Esperanto”



Kiam nia Ĝenerala Sekretario anoncis en la Ferma Kunsido de la 46a Universala Kongreso en Harrogate, ke U.E.A. fine sukcesis trovi kaj aĉeti al si vere taŭgan propran domon en Roterdamo, la entuziasmo de la ĉeestantaj esperantistoj estis rimarkinda. Tiu entuziasmo estis prava. Multaj preparoj kaj grandaj laboroj fare de la Direktorino kaj la oficistaro de nia Asocio estis necesaj antaŭ ol la konstruaĵo fariĝis preta kaj taŭga por la laboro de UEA, kaj kompreneble la translokigo mem de nia tuta havaĵo ne povis okazi en unu tago. Sed la beligo kaj modernigo, ne nur de la interno sed ankaŭ de la ekstero, fine atingis tian stadion, ke oni jam povis definitive okupi la domon kaj tie plenumi la multnombrajn taskojn de la Asocio. Do ĵaŭdon, la 12an de aprilo, 1962, povis okazi la Oficiala Inaŭguro.

Estus bone unue konigi al la membraro la trajtojn kaj aspekton de ilia domo. Ĝi estas kvaretaĝa konstruaĵo sur grava kaj homplena strato. La montrofenestroj estas kompreneble bele aranĝitaj, kun arte dismetitaj esperanto-libroj kaj revuoj, kaj ĉiumomente haltas preterpasantoj por atente rigardi ilin. La nomo de U.E.A. estas klare videbla, kaj la esperanto-flago fiere flirtas supre. Oni eniras, supreniras kelkajn ŝtupojn ĝis la unua etaĝo, kaj


vidas maldekstre la oficejon de la Direktorino. Tien ne iras tamen la vizitanto, sed prefere alproksimiĝas al akcepta barilo kaj sonorigas. Aliflanke de la barilo estas du oficejoj, sur kiuj klare vidiĝas la etikedoj: *Administrado* kaj *Librotenado kaj Kongreso*. El la unua nun venas al la vizitanto oficistino, al kiu li klarigas sian aferon. Ni supozu, ke lia afero rajtigas lin iri malsupren al la teretaĝo, kie troviĝas du aliaj oficejoj: unu granda, kiu nomiĝas *Ekspedejo*, kaj unu malpli granda, kie estas la *Libroservo*. Aŭ eble li deziras konsulti la *Bibliotekon*; por ĝin atingi, li iras denove supren al la dua etaĝo. Kompreneble la biblioteko ankoraŭ ne estas preta, sed tie troviĝas la elementoj, kaj post nelonge ĝi certe estos finordigita.

Nu, ne havas plu sencon iri pluen. La domo havas sume 15 ĉambrojn, kaj ĝis nun nur la menciitaj estas aranĝitaj kaj uzataj. Venos tuj la vico de la aliaj. Sed tiuj, kiuj estas jam pretaj donas efektive bonegan impreson al la vizitanto; ĉie estas helaj koloroj kaj modernaj mebloj kaj iloj, tiel ke la laboro estas farata kiel eble plej glate en kiel eble plej impresa kaj instiga ĉirkaŭaĵo.

Je la 10 a 30, la 12an de aprilo, okazis en la domo la Solena Inaŭguro. Ĉeestis pluraj estraranoj de UEA, reprezentantoj de diversaj esperantistaj orga-



Ce la inaŭguro parolis interalie la vicurbestro de Rotterdam, s-ro Schilthuis



S-ro Wensing, direktoro de la sekcio elektro-medicinaj aparatoj ĉe la Philips-fabrikoj



kaj s-ino Isbrucker de la Universala Ligo



La Direktorino de la Centra Oficejo en sia laborĉambro

nizaĵoj, aliaj nederlandaj esperantistoj, kaj ĵurnalistoj de la nederlanda gazetaro, kiu tre favore kaj amplekse raportis poste la okazaĵon.

F-ino M. H. Vermaas, Direktorino de la Centra Oficejo, malfermis la kunvenon kaj transdonis la parolon al s-ro H. W. Holmes, O.B.E., vicprezidanto kaj aganta prezidanto de UEA. S-ro Holmes bonvenigis la vicurbestron de Rotterdam, s-ron J. U. Schilthuis, kaj ties edzinon, kaj dankis ilin pro ilia ĉeesto. Li esprimis la esperon, ke la laboro de UEA alportos nur honoron al la urbo, en kiu troviĝas ĝia Centra Oficejo.

Respondante, s-ro Schilthuis transdonis saluton de la urbestro, kiu ne povis ĉeesti ĉar en tiu momento li estis for de la urbo. Poste li parolis pri la lingva ĥaoso, kiu devigas nederlandanon lerni plurajn lingvojn se li volas aktive partopreni la internacian vivon, kaj diris ke, troviĝante en rondo internacia, kie oni parolas la internacian lingvon, oni estas devigata al meditado pri la tuta problemo. Li kun granda intereso informiĝas pri la rolo de UEA.

Post li parolis s-ro Wensing, direktoro de la sekcio elektro-medicinaj aparatoj ĉe la Philips-fabrikoj. Unue li parolis en Esperanto, gratulante la estraron de UEA pro la akiro de tiel taŭga domo por la mondampleksaj taskoj de la Asocio. Li esperis, ke la C.O. fariĝos la Mekko de la tutmonda movado dum ties nehaltigebla marŝo al la fina rekono. Poste en la nederlanda lingvo li parolis pri la lingva problemo en la komercaj rilatoj. En la komerco okazas rapida evoluo; ĉiurilate la ekonomio funkcias pli glate. Nur unu problemo restas — la multlingveco, antaŭ kiu la mondo

klinas la kapon kaj ĝin akceptas. Oni devas kapti Esperanton ambaŭmane, ĉar ĝi jam pruvis sian plenan valoron. Feliĉe komercistoj komencas ĝin agnoski: li citis ekzemple novan libreton eldonitan en Germanujo, kiu enhavas en pluraj lingvoj la opinion de diversaj gravaj firmaoj, kiuj uzas Esperanton en siaj rilatoj, kaj li aldonis, ke la firmao Philips baldaŭ eldonos grandan katalogon pri siaj elektro-medicinaj aparatoj en la internacia lingvo.

En la nomo de Universala Ligo, la Internacia Esperanto-Instituto, la Prezidanto de la Akademio kaj s-ro Cseh, salutis la kunvenon s-ino Isbrucker. Samtempe ŝi anoncis, ke anonima donacinto komisiis ŝin transdoni la sumon de 5.000 guldenoj por unu ĉambro en la domo. Per varmegaj aplaŭdoj la ĉeestantoj salutis la anoniman mecenaton, kaj estraro s-ro Woessink akceptis la donacon en la nomo de UEA.

Sekvis la salutoj de Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI) kaj de ties nederlanda sekcio, kaj de la loka grupo "Merkurio", kiujn transdonis s-ro Brakel; la salutojn de la landa asocio LEEN transdonis ties prezidanto, s-ro H. Kervers; kaj la ĉefdelegito de UEA por Nederlando, s-ro J. Telling salutis en la nomo de la individuaj membroj kaj de la PTT-grupo "La Espero". Kune kun siaj salutoj, ĉiuj tri transdonis ankaŭ donacojn por la nova domo.

Tiam la Ĝenerala Sekretario de UEA, Prof. D-ro Ivo Lapenna dankis la vicurbestron pro lia ĉeesto kaj pro liaj afablaj vortoj kaj bondeziroj. Li diris, ke kiam antaŭ kelkaj jaroj la estraro de UEA deci-



Kunsidas la Estraro de UEA. De maldekstre vidiĝas: D-ro Herrmann, F-ino Vermaas, D-ro Lapenna, S-ro Holmes, S-ro Woessink kaj S-ro Rajski. Ĉeestis ankaŭ, sed ne vidiĝas sur la bildo, S-roj Smith kaj Auld.

dis translokigi la Centran Oficejon al Rotterdam, tio ne estis hazarda elekto. Por organizaĵo kiel UEA ne estas egale, kie troviĝas ĝia centro. Ĝi estas vere universala kaj havas membrojn en ĉiuj partoj de la mondo. Ĝi estas unu el la vere maloftaj organizaĵoj, kiujn oni ne nomas internaciaj pro la partopreno de kelkaj hazardaj landoj, sed kiuj estas vere tutmondaj. Estas grave, ke ĝia sidejo troviĝu en urbo kun spirito ankaŭ internacia, ĉar tia urbo povas pli bone kompreni ĝiajn celojn, kaj la ĉeesto de la vicurbestro montris tiun komprenemon. Iusence Rotterdam havas alian trajton komunan kun Esperanto : dum la milito la nazioj detruis la urbon, sed post la milito la urbo leviĝis el la cindroj, kaj nun ĝi estas unu el la plej modernaj. Same la nazioj volis detrui ankaŭ la internacian lingvon kaj ĝian internacian organizaĵon, sed poste leviĝis la movado, kaj hodiaŭ ĝi estas pli potenca ol iam antaŭe. Tial la spirito de Rotterdam estas konforma al la celoj de UEA kaj de la movado ĝenerale. De kiam ni venis al Rotterdam ni sukcesis preskaŭ duobligi la membraron, kaj certe nun kun propra domo ni eĉ pli progresos.

Poste D-ro Lapenna dankis ĉiujn, kiuj kontribuis kaj daŭre kontribuas al la aĉeto de la domo. Li dankis s-inon Dorothy Henderson el Kanado, s-ron Epstein el Hamburgo kaj la anoniman donacinton pro iliaj malavaraj kontribuoj; li atentigis, ke alia estas mecenato per partopagoj; kaj li esprimis la esperon, ke tre baldaŭ sekvos aliaj, kiuj volas tiamaniere helpi la Asocion. Li plue atentigis, ke f-ino Vermaas devis vere multege labori en la afero, kaj ankaŭ aliaj nederlandaj esperantistoj. La oficistoj de UEA ne estas oficistoj en la ordinara komerca senco : ili estas esperantistoj, kiuj dediĉas sian tempon kaj energion por Esperanto ofte multajn horojn ekster la normala laboro, kaj pro tio li

esprimis al ili dankon. Sed oni ne forgesu, ke la domo estas ankaŭ la rezulto de multjara internacia laborado, kaj donas solidan materian bazon al la movado. Por atingi tion, ke Esperanto transformiĝis el projekto en vivantan lingvon malgraŭ multaj antaŭjuĝoj kaj grandaj malfacilaĵoj, necesis sindona laboremo, inteligento kaj talento de miloj da personoj. Nia movado ĉiam havis cerbon kaj koron. Nun, kun tiu nova materia bazo ĝi elpaŝos al novaj atingoj. Finiĝis la periodo de la Unua Laborprogramo de UEA, kaj venis la tempo por akcepti novan laborprogramon. La lingva problemo sentiĝas pli kaj pli, ĉie en la mondo, eĉ en la angle-parolantaj landoj. Estis ĝuste en la brita parlamento, ke lastatempe oni proponis la kreon de Eŭropa Akademio por solvi la lingvan problemon. El la kritikoj pri la angla lingvo de la leĝproponinto mem klare vidiĝas, ke neniue nacia lingvo kapablas ludi la internacian rolon. Tiurilate la situacio daŭre malboniĝas : antaŭ la Unua Mondmilito la diplomatia lingvo estis la franca; inter la du militoj estis la angla kaj franca kune; nun UNO havas 5 oficialajn lingvojn kaj UNESKO 8.

Konklude, D-ro Lapenna instigis la membraron obstine labori por realigi la Duan Laborplanon de UEA.

Poste okazis la oficiala malfermo de la domo. S-ro Schilthuis, post kelkaj bondeziraj vortoj en Esperanto, tranĉis verdan rubandon kaj eniris la supran parton de la domo, kie li partoprenis kun ĉiuj ĉeestantoj en kaŝtrinkado kaj ĝenerala konversacio.

Okaze de la Inaŭguro venis al la C.O. multaj donacoj, tute speciale salutbukedoj, kies belaj koloroj multe kontribuis al la gajeco kaj optimisma spirito de la kunveno.

KVARA ĈAMBRO POR LA DOMO DE U.E.A. !

KVINA KAJ SESA ĈAMBROJ PREPARATAJ !

Kiel oni povas legi aliloke en ĉi tiu numero, dum la inaŭguro de la domo la Estraro ricevis la sumon de 5000 gld por provizore ankoraŭ ANONIMA ĈAMBRO. La elektita nomo estos poste publikigita.

Plue, dum la Estrarkunveno venis letero de S-ro Nassif Isaac, Qatar, Araba Golfo, per kiu li disponigis komencan sumon de 200 dolaroj (ĉ. 720 gld) por ARABA ĈAMBRO kaj informis ke baldaŭ li kompletigos la sumon ĝis 5000 gld.

Krome, la prezidanto de Sveda Esperanto-Federacio en la samaj tagoj petis nin rezervi ĉambron, ĉar oni estas kolektanta sumojn por SVEDA ĈAMBRO.

Ni esprimas ĉi tie niajn elkorajn dankojn pro ĉi tiuj novaj iniciatoj, kiuj montras, kiel la nova sidejo de la Asocio ekokupis lokon en la koroj de niaj membroj. Sekvu multaj aliaj ĉi tiujn belegajn ekzemplojn !

„LA ETA,

ĈARMA

LAND' ”

VOKAS!



Denove la danoj laboras por aranĝi nombron da internaciaj renkontiĝoj: antaŭkongreso okazos en Helsingør, postkongreso en Faaborg, Geografia Semajno en Odense kaj la Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago. Antaŭ nur 6 jaroj ni invitis la UK, kaj tiam multaj esperantistoj sekvis la alvokon. Kaj pro la entuziasmo de la partoprenintoj kaj pro la speciale favoraj cirkonstancoj en Danlando nuntempe por Esperanto, ni kuraĝis denove inviti la kongreson en Kopenhago. Pri tiu kongreso la LKK jam dum multaj monatoj energie laboras, kaj jen kelkaj pliaj informoj, kiuj certe interesas ĉiun esperantiston:

La kongresejo situas en strato flankigita de pluraj parkoj, tiel ke, se la kongresanoj deziras sin iomete refreŝigi, ili nur bezonas transiri la straton por esti ĉirkaŭitaj de verdaĵo kaj floroj. La kongresejo mem estas bela konstruaĵo, la Teknika Universitato. Ĝi estas sufiĉe granda por ĉiuj aranĝoj escepte de la Inaŭguro kaj la teatraĵoj. En ĝia belaspekta festsalono okazos la Internacia Somera Universitato. En la konstruaĵo mem tute supre estos restoracio, kaj en la granda ronda halo malsupre, kie troviĝos tabletoj, seĝoj kaj verdaj arboj, oni povos havigi al si teon, kafon, glaciaĵon kaj diversajn trinkaĵojn. En la antaŭhalo estos telefonoj por la kongresanoj, kiosko kun diverslandaj gazetoj ktp.

La teatra vespero okazos en la plej granda kaj plej moderna teatro de la lando, la "Falkoner-Teatro", kiu povas enhavi iom pli ol 2000 personojn (tial ni estas devigitaj ne akcepti pli ol 2200 aliĝojn). Bonege oni vidas kaj aŭdas en kiu ajn loko en la teatro.

La bankedon ni aranĝos en la plej luksaj restoraci-salonoj. La mebloj estas kovritaj per

silko kaj brokado, kaj por la vandoj estas uzita vera oro. Post la bankedo oni nur transiros la straton por atingi alian palacon, kie estos la balo.

Por la Inaŭguro ni mendis la "Koncertan Salonegon" en "Tivoli", la famkonata dana fabelĝardeno. Belega estas la domo por la Inaŭguro kaj belega la salonego — kaj pli ol ĉarma estas "Tivoli", kiun ĉiuspekaj homoj ŝatas. — Iri en "Tivoli" matene, kiam la arboj kaj floroj estas ankoraŭ freŝaj post la nokto, estas ĉarme. Posttagmeze la atmosfero estas alia — amuza. Oni provas la diversajn amuzaĵojn, sidas en restoracio, promenas, rigardas, partoprenas en la ĝenerala gajeco. Sed vespere — kiam la suna lumo estas for — "Tivoli" estas rava, kiel nur "Tivoli" povas esti. Oni sentas sin en tute alia mondo. — Post la milito mi iun vesperon estis en teatro, kaj sur la stratoj por la unua fojo mi vidis la brilantajn novajn neonreklamojn, — kiel mi ĝuis la urbon! Post iom da promenado laŭ la ĉefaj stratoj, trans la urbdoma placo ni venis al "Tivoli". Sed enirinte tie, mi estis tute muta. La ĝardeno estis por mi tiom ĉarmega, ke mi tuj ekpensis pri la "Fabeloj de 1001 noktoj". La belegan "Nimb" oni tute ne povas priskribi — sed venu kaj vidu. — Lumo, lampoj, arboj, floroj, herbaro, lagetoj, fontanoj, muziko, ĉarmaj kafejoj, amuzaĵoj kaj artfajraĵo — tiel estas nia — kaj via, se vi venos — fabela lando "Tivoli".


Ekzistas, kiel jam menciite, ankaŭ aliaj parkoj en Kopenhago — belaj kaj vastaj kun kasteloj viziteblaj kiel muzeoj. Kopenhago havas ankaŭ multajn aliajn muzeojn, kaj unu el ili, la "Ŝtata Artomuzeo", situas tute proksime de la kongresejo. — Multege da vidindaĵoj posedas Kopenhago, sed iru nepre al la marbordo "Langelinie", kie vi vidos la marvirineton de H. C. Andersen. Iru ankaŭ laŭlonge de "Øresund" kaj sentu iom de la tipe dana atmosfero: freŝa kaj milda.

Se vi deziras sperti pli de tiu freŝeco kaj mildeco, mi rekomendas al vi partopreni ekskurson — tiamaniere vi havos okazon vidi krom aliaj urboj ankaŭ la danan agrikulturon: la riĉajn bienojn, imponajn kastelojn (i.a. "Kronborg" — famkonata de Hamleto), arbarojn, lagetojn, maron — sed NE montojn. Ĉar kiel estas dirite en dana kanto: "resti ĉe la tero por ni plej bone taŭgas". Jes, ni restas "ĉe la tero" ankaŭ tempore, tial ni eble estas priparolataj kiel la "mildaj kaj ridetemaj" danoj, la "plej gastigemaj en la mondo" — se oni povas fidi la gazetojn. Ili ofte informas, ke tiel diras la turistoj. — Gastigemaj ni almenaŭ estas, kaj tial ni dum la lasta jaro faris, daŭre faras kaj faros nian absolute plej eblon por ke vi, partoprenontoj de la 47-a Universala Kongreso de Esperanto, pasigu interesan, agrablan kaj ĉarman semajnon en la lando, kie

"— abundo estas malofta, kaj manko eĉ pli malofta".

Bonvenon al la 47-a.

Kirsten Zacho




Rigardo de la urbodomo


La 47a U.K.




Strato proksime al la urbodomo



Bieneto




La kastelo "Kronborg"




H. C. Andersen


atendas vin!



Vikinga ŝipo



Novhaveno



La "Borso"



Malnova haveno



La kastelo "Frederiksborg"

PRI LA GEPATROJ DE G.S. TITOV

S-ano Th. Kilian vivis dum la unua mondmilito kvar jarojn kiel militkaptito en la siberia urbo Tomsk, kie li fariĝis esperantisto. En la tiea Esperanto-Klubo li aŭdis ankaŭ la nomojn de samideanoj instruisto A. M. Toporov kaj pastro I. Seriŝev. Ili vivis en la "proksima" — laŭ siberia mezurilo — belega Altaĵa regiono kaj ĝuste tie naskiĝis la kosmonaŭto German Stepanoviĉ Titov. Legante la rusan broŝuron "700 mil kilometrojn en la kosmo", s-ano Kilian konstatis kun miro, ke s-ano Toporov estis instruisto de Stepan Pavloviĉ Titov, la patro de la kosmonaŭto G. S. Titov. Ĝis tiam s-ano Kilian multe okupis la demando, kiel s-ano S. P. Titov konatiĝis kun Esperanto en fora Siberia vilaĝo. Nun li trovis la solvon de la enigmo; li konkludis jene: s-ano Toporov konatiĝis kun Esperanto ĉe la fervorega s-ano Seriŝev kaj s-ano Titov ĉe sia instruisto Toporov. S-ano Kilian skribis pri sia supozo al s-ano S. P. Titov kaj ricevis la sekvantan tre amikan respondon.

Pavel Sittauer



(La letero estas parte en Esperanto, parte en la rusa. La rusa teksto estas presita kursive. — Red.)



Kara kaj estimata Fjodor Ivanoviĉ!

Permesu al mi esprimi mian sinceran dankon por Via letero, por Viaj bonaj sentoj kaj la sendaĵo — la lernolibro. Dum 25 jaroj mi ne uzis la lingvon kaj por mi estas tre malfacile esprimi miajn pensojn per Esperanto. Permesu al mi skribi ruse, krom tio Vi iam loĝis en Siberio kaj devas kompreni la rusan lingvon. Ĉi tio estas por Vi necesa, por ke Vi ne forgesu la potencon lingvon!

Ĉiuj lokoj, kiujn Vi menciis en Via letero kaj kie Vi vivis dum la milito, estas al mi konataj. Via supozo pri tio, kie mi povis konatiĝi kun Esperanto, estas ĝusta. A. M. Toporov donacis al mi en la jaroj de mia juneco malgrandan vortareton de la lingvo Esperanto kaj tiam komenciĝis mia konateco kun la lingvo. Pri Inocento Seriŝev rakontis al mi ankaŭ li kaj ĉe li (ĉe Seriŝev) Toporov konatiĝis kun tiu lingvo. Seriŝev ankoraŭ vivas, li loĝas en Aŭstralio, pri tio mi sciigis de lia fratino, kiu vivas en la ĉirkaŭaĵo de Moskvo.

Nun mi ricevadas multe da leteroj. Skribas esperantistoj el ĉiuj kontinentoj, por diri la veron, el Antarkto mi ricevis ankoraŭ nenion. La poŝtaĵo estas tiel abunda, ke ne eblas respondi al ĉiu. La esperantistoj provizas min per perioda literaturo kaj lernolibroj. Iom post mi denove proprigos al

mi la lingvon, kvankam mi nun havas por tio mal multe da tempo: necesos iri renkonte al la homoj, ĉar la intereso kiel pri mia filo tiel pri mi mem ankoraŭ ne malvarmiĝis.

Mi dankas al Vi por la foto, nun mi bone prezentas Vin al mi kaj konatiĝis kun Via edzino. Transdonu al ŝi saluton de mia edzino.

Estu, kara samideano, sana, feliĉa kaj laborkapabla!


Sincere Via

S. Titov

P.S. Mi tre bone komprenis Vian leteron, sed kiel vi komprenos mian skribaĵon?



Nia foto reproduktas la foton de s-ano Titov kaj lia edzino, la esperantan dediĉon, kiun skribis s-ano Titov sur la dorsa flanko, kaj la koverton de la supra letero. — Red.





LA JUNA VIVO

Cion por la redakcio de "L. J. V." sendu al :
Heinrich Reiter, Van der Nüllgasse 100/10/15
Wien X, Aŭstrujo.

TEJO — SEKCIOJ KAJ GRUPOJ, RAPORTU !

La informado de la esperantistaro kaj neesperantistaj medioj pri nia agado estas ege grava. Tre menciindaj agoj kaj sukcesoj naciaj ofte restas internacie nekonataj. Imitindaj ekzemploj pro nekonateco ofte ne povas esti imitataj. Niaj tutmondaj geamikoj tro malmulte scias pri vi kaj via laboro. Kial vi ne informas ilin per nia internacia organo "La Juna Vivo" ?

LJV iĝu vere aktuala spegulo de TEJO, ĝiaj sekcioj kaj grupoj ! Ĉiu landa sekcio kaj ĉiu grupo nomigu specialan funkciulon por informi la redakcion de LJV pri la agadoj.

La plej grandaj kaj plej fortaj sekcioj de TEJO ĝis nun nur malmulte aŭ tute ne havas kontakton kun nia redakcio. Mi petas ĉiujn respondeculojn, ŝanĝi tiun-ĉi letargian sintenon kun ĝoja kunlaboremo. Samtempe mi deziras danki al ĉiuj, kiuj per raportoj aŭ aliaj kontribuoj ĝojigis nian internacian geamikaron.

Heinrich Reiter

Aŭstrujo

Dum laborkunsido, kiun ĉeestis junaj delegitoj el tri liglandoj, estas decidite, prepari la oficialan fondiĝon de aŭstria TEJO-sekcio en la kadro de la AEF. La fondo efektiviĝos dum la AE-Konferenco, okazonta pentekoste en LINZ/Danubio.

La viena junulara E-grupo sukcesis prezenti en Esperanto la komedion "Konvenaĵoj" de Bilimin. La programo estis ankoraŭ pliriĉigita per parodioj, skeĉoj kaj modernaj kantoj, same ĉiuj en Esperanto. La multnombra E-publiko de Vieno — inter ĝi preskaŭ la tuta estraro de AEF — estis ege kontenta kaj kritikis la aranĝon tre pozitive.

☆

Salutojn el Pollando ...

....sendas la junulara Esperantorondo "Guto en maro" (Poŝta Liceo, strato Grodzka 34, NOVY SACZ 1) al siaj tutmondaj TEJO - geamikoj. La grupo volas kunhelpi en la disvastigo de Esperanto inter la gejunularo. **Krucvortenigmo n-ro 3**

☆

El Hispanujo ...

....skribas nia amiko Salvador Arago: "Iomete prokrastite mi sendas al vi fotografajon pri junulara renkontiĝo en Barcelono okaze de la malkovriĝo de marmortabulo kun orlitteroj sur la fasado de la lerneja grupo "Juan Antonio Parera", strato d-ro Lazaro L. Zamenhof. Mi sendos al vi regule novajn informojn."

☆

Krucvortenigmo n-ro 3

Horizontale: 1) samtempa harmonia kelktona sonado; 6) aparte, antaŭ ĉio (r); 11) esprimo, pervorta penskonigo; 12) komencliteroj de la itala radiotelevido; 14) ceremonia papa kapvesto (r); 15) transigi sur iun lokon (r); 16) homa sento-centro (r); 17) senpieda rampbesteto; 18) instrumento (r); 19) artikolo; 20) la malo de virkato (r); 21) malkovri per supozoj; 24) unucifera numeralo; 25) idonaska estaĵo; 27) angla biero (r); 32) dependiga konjunkcio; 33) artikinflamo; 34) disdivida prepozicio; 35) montra kvalita korelativo; 37) negacio; 38) la plej perfekta estaĵo (r); 39) montra adverbo; 40) disdivida prepozicio; 42) tiu kiu maljesos; 45) esti multnombra; 48) rilata al ambaŭ sek-


soj (r); 49) unupunkta ludkarto (r); 50) senduba, fiksa; 51) havi inklinon por iu, ŝati; 53) vertikale granda (r); 54) instrumentoj (r); 55) personpronomo; 56) malsaneca ruĝa hautŝvelaĵo; 57) teatroludisto; 58) simbolo de venko, gloro.

Vertikale: 1) rilate al administrejo; 2) manierkorelativo; 3) rektangula (r); 4) greka litero; 5) valora metalo; 6) respektoplena al Dio kaj religio (r); 7) laŭlonge malvolvi, prezenti (r); 8) rondire moviĝi (r); 9) estinta; 10) ĉefroluloj; 13) batalejo (r); 16) natura subtera kavaro; 17) plurala personpronomo; 19) triapersona pronomo; 21) sekve; 22) ne cedi (r); 23) printempa floro kun grandaj ĝenerale violaj floroj kaj ponardsimilaj folioj; 26) maljesi; 29) sukcesu tuŝi ion, akiri; 31) kolektive, grupo; 36) ekipaĵo, instrumento (r); 39) plifortiga, akcenta adverbo; 41) manĝebla duklapa molusko; 43) samgranda (r); 44) senalkohola trinkaĵo (r); 46) lakteltirado el bestmamoj (r); 47) nedifina kvalita korelativo; 49) betulaca arbo de marĉterenoj; 52) kvarcifera numero; 53) pik- aŭ tranĉ- randa, malnova angla unuo por termezuro (r); 55) nedifina korelativo; 56) alternativa konjunkcio.

Geamikoj ! Bonvolu sendi la solvon de la enigmo ĝis plej malfrue la 10-a de Aŭgusto al la redaktoro de LJV. El la ĝustaj solvoj tri estos premiitaj per libroj, kiujn disponigos al ni s-ano Hofrat Hugo Steiner, fondinto-direktoro de la Internacia Esperanto-Muzeo en Wien.

Mi ege ĝojus, se vi sendus kun la solvo ankaŭ informeton pri la junulara Esperanto-vivo en via urbo, regiono ktp.

La Red.



Ivica, Sponar, Zagreb

LA MALFRUA APERO DE TIU ĈI NUMERO

Bedaŭrinde, pro redakciaj malfacilaĵoj la preparado de tiu ĉi numero suferis konsiderindan prokraston. Espereble niaj legantoj bonvolu tion pardoni.

La redaktoro



Grupo de niaj
Hispanaj ĝeamikoj

INTERNACIA EKZAMENO

La Internacia Ekzamena Komisiono denove ekzamenos en Kopenhago. Skriba parto: la 2-an de aŭgusto. Parola parto: la 3-an de aŭgusto. Al la ekzameno povas esti allasita nur persono, kiu sukcese finis per diplomo minimume mezgradan lernejon kaj kiu plene posedas la Internacian Lingvon. Ĉiu persono, kiu deziras kandidatiĝi, bonvolu sendi, kiel eble plej frue, al la sekretariino de I.E.K.: esperantlingvan tradukon de la diplomo pruvanta, ke la kandidato finis mezlernejon (la ĝusteco de la traduko devas esti konfirmita de kompetenta instanco), kaj ateston pri sukcese plenumita supera ekzameno de Esperanto en sia lando, aŭ alian pruvon pri plena posedo de la lingvo. La kotizo por la ekzameno estas du usonaj dolaroj kaj devas esti pagita samtempe. (Oni akceptas UL-stelojn aŭ int. respondkuponojn.) Akceptitaj kandidatoj ricevos specimenajn demandarojn kaj pli detalajn informojn.

Sekretariino: F-ino Marjorie Boulton, 1 Inglefield Avenue, High Lane, Burslem, Stoke-on-Trent, Staffs., Anglujo.

INTERNACIA EKZAMENA KOMISIONO

Listo de rekomendita literaturo

La kandidato kompreneble legos abunde en la originala kaj tradukita literaturo de Esperanto. La suba libro-listo temas nur pri fakaj libroj.

- L. L. Zamenhof: *Fundamento de Esperanto*.
Lingvaj Respondoj (Plena Kolekto)
Originala Verkaro
- E. Drezen: *Historio de la Mondlingvo*
- C. Støp-Bowitz kaj J. R. G. Isbrucker: *La Esperanto-Movado*
- I. Lapenna: *La Internacia Lingvo* (Faktoj pri Esperanto)
Retoriko (dua eldono; unua parto)
- E. Privat: *Historio de la Lingvo Esperanto*
Vivo de Zamenhof
Esprimo de Sentoj en Esperanto
- M. Boulton: *Zamenhof* (aperonta en 1962)
- K. Kalocsay: *Lingvo, Stilo, Formo*
- K. Kalocsay kaj G. Waringhien: *Plena Gramatiko de Esperanto; Parnasa Gvidlibro*
- G. Waringhien: *Lingvo kaj Vivo*
- P. Neergaard: *Fremdvortoj en Esperanto*
- W. E. Collinson: *Enkonduko en la Lingvosciencan* (aperonta en 1962)
- W. Gilbert: *Planlingvaj Problemoj: Esperanto kaj la Naturalismo* (aperonta en 1962)
- W. Manders: *Interlingvistiko kaj Esperantologio*
- P.E. Stojan: *Bibliografio de Internacia Lingvo*
- Drago Krajl: *Kvar Prelegoj pri Esperanta Literaturo*
- Plena Vortaro de Esperanto*
- Enciklopedio de Esperanto: la plej gravaj artikoloj.*
- R. Rakuša: *Instrumetodo por Esperanto*.
Metodiko por Esperanto-Instruado
Lernolibro kiel Helpilo
 (La du lastaj troviĝas en la libro *Esperanto kaj Lernejo*, Ljubljana, 1959.)

Fakterminaroj diversaj laŭ la specialaj interesoj de la kandidatoj.

Revuoj: *Esperanto*
Esperantologio
Internacia Pedagogia Revuo

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1962

Stato je la 31-a de marto

Konkurso I

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Nederlando	4942	4633	93,75
2.	Usono	3610	3120	86,43
3.	Svislando	2103	1715	81,55
4.	Hispanujo	2557	2085	81,54
5.	Svedujo	6190	5020	81,10
6.	Francujo	6754	5406	80,04
7.	Britujo	6661	5297	79,52
8.	Finnlando	2525	1985	78,61
9.	Italujo	4253	3165	74,42
10.	Danlando	2876	2018	70,17
11.	Norvegujo	1677	1060	63,21
12.	Germanujo	7085	4330	61,12
13.	Brazilo	4142	2365	57,10
14.	Japanujo	3265	1505	46,09
15.	Belgujo	2006	825	41,13
16.	Jugoslavio	5560	1245	22,39


Konkurso II

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Argentino	505	715	141,58
2.	Portugalujo	515	460	89,32
3.	Israelo	285	240	84,21
4.	Aŭstralio	1148	878	76,48
5.	Kanado	746	560	75,07
6.	Aŭstrujo	1440	905	62,85
7.	Sudafriko	250	150	60,—
8.	Islando	250	105	42,—
9.	Madagaskaro	250	95	38,—
10.	Urugvajo	250	95	38,—
11.	Nov-Zelando	1184	330	27,87

Ŝaka Rubriko

(Gvidas: D-ro V. Faigl, Zlonice, Ĉeĥoslovakio)

Problemo n-ro 19 (konkurso 1962 — n-ro 3)
 J. Aizikowicz (Haifa, Israelo)



Mato en 2 movoj (pro ĝusta solvo 2 poentoj).

Kontrolo: Bl.: Rg5, Tg1, Kf1, Kh8, Ĉd8, Ĉe4, p.d3

Ni.: Rd5, Ta4, Tc5, Ĉa3, p.: b2, d6

Solvojn sendu al gvidanto de Ŝaka rubriko, D-ro V. Faigl, Zlonice, Ĉeĥoslovakio ĝis 31.6.62.

Vilho Setälä 70-Jara

La 4-an de aprilo okazis la 70-jara datreveno de la naskiĝo de magistro Vilho Setälä. Li eklernis Esperanton en 1906 kiel 14-jara junulo, kun kelkaj kamaradoj en studocirklo, kies gvidanto li fariĝis. Dum lia studado en la universitato de Helsinko en 1911 li kompletigis sian lingvoscion kun aliaj studentoj kaj konatiĝis kun la ideoj de d-ro Zamenhof, kiuj profunde efikis al lia menso kaj fariĝis direktilo por lia tuta vivo. Li tuj komprenis la mondvastan signifon de neŭtrala internacia lingvo por la solvo de lingva problemo kaj por la interfratiĝo de la popoloj. Li aliĝis al ĉefurba societo La Polusstelo kaj fondis en 1912 Studentan Societon Esperantistan, aliĝis al UEA kaj akceptis delegitecon por Helsinko, komencis redakti la Finnlandan Esperantiston, instruis en la blindul-lernejo kaj redaktis broŝuron por Turista Asocio de Finnlando. En 1914 li ricevis stipendion de la Turista Asocio por eŭropa rondvojaĝo, por paroli pri Finnlando per Esperanto. La vojaĝon ĉesigis la mondmilito.

Post la milito li komencis energiplenan propagandan laboron en la gazetaro, verkis serion da broŝuroj kaj redaktis la novan organon Esperanta Finnlando. En 1917 aperis unua eldono "Esperanta Legolibro", kiun sekvis vortaroj Esperanto-Finna kaj Finna-Esperanta. Lia talenta kaj persista laboro portis belan rikolton: multaj novaj adeptoj kaj kreskanta simpatio en ĉiuj popoltavoloj. La sukceson kronis la 14-a universala kongreso en Helsinko en 1922, kies ĉefa organizanto li estis. Kiel direktoro de fondita Esperanto-Instituto de Finnlando li laboris por ekzamenoj kaj novaj lernolibroj. Komitatano de UEA li estas ekde 1921, koresponda membro de Akademio de Esperanto de 1924 kaj membro de 1930.

Post la dua mondmilito li rekomencis novan periodon de fervora laboro por Esperanto: propagandaj artikoloj, paroladoj, someraj kursoj kaj verkado de lernolibroj, inter ili la bone konata Privilegia Vojo. Lia profesia verkado estas ege vasta kaj multflanka. En 1955 li kun sia edzino fondis organizaĵon "Fondumo Esperanto, Helsinko", kie estas deponita la plej granda esperanto-biblioteko en Finnlando, kaj kiu per sia kapitalo povis rimarkinde subteni propagandon en Finnlando dum la lastaj jaroj.

Ni tutkore gratulas fidelan jubilon kaj deziras al li bonan sanon kaj longan vivon.

RICEVITAJ LIBROJ

Charles Vivian: AMUZO PER SCIENCO. Fotoj de S. A. R. Watts. El la angla trad. D. R. Duncan, Ph. D., B. Sc. Eld. Associated Newspapers Limited, Londono, 1962. 96 p. 25.3 × 19 cm. Prezo: 7 ŝ. 6 p. (15 steloj).

JUGU MEM! FAKTOJ PRI ĈEĤOSLOVAKIO. Dua, reverkita eldono. Tradukis Miloš Lukaš. Eld. Orbis, Prago, 1961. 110 p. 16.3 × 12.3 cm. Prezo: Kčs 5,70.

ESPERANTO EN KOMERCO. Raportaro en kvin lingvoj: Esperanto, angla, franca, hispana, germana. Eld: Esperanto-Rondo Crailsheim-Germanujo, 1962. 105 p. 20.6 × 14.5 cm. Prezo: gm. 1,50, (5 steloj).

FACILAJ LEGAĴOJ. Kompilata kaj komentita de Miyamoto M. Eld: Daigakusyorin, Tokio, 1961. 116 p. 17.2 × 10.3 cm. Prezo: Y 180.

LAŬDEZIRA KALKULO DE KENNEDY. Eld. Ĉina Esperanto-Ligo, Pekino, 1962. 25 p. 18.5 × 13 cm. Prezo nemontrita.

KNABINO KAJ GAROLO. Versoj de Liu Ĝaŭlin; bildoj de Ĉeng Ŝifa; traduko de Laŭlum. Eld. Ĉina Esperanto-Ligo, Pekino, 1962. 38 p. 25 × 17 cm. Prezo nemontrita.

LA ANNE FRANK DOMO

La "Anne Frank Domo" en Amsterdam, mondkonata pro la taglibro, kiun Anne Frank verkis en, kaj pri ĝi, nuntempe estas konservata en sia aŭtentika stato. Ĉiun jaron multegaj vizitantoj, eksterlandanoj kaj Nederlandanoj, trapasas la mallarĝajn koridorojn kaj ŝtuparojn, gvidataj de junulo eksplikanta en kvar lingvoj. Fine de la rondiro oni povas rigardi koncizan ekspozicion de fotoj kaj de la taglibro en multaj tradukoj. La Esperantlingva eldono bone aspektas meze de la aliaj.

Se la vizitanto interesiĝas pri la domo, kaj pri la internacia junularcentro nuntempo al ĝi ligita, li povas registri sian nomon tie. La registrilaj kartoj kuŝas pretaj en diverslingvaj tradukoj, i.a. en Esperanta. Faldfolio pri la domo enhavas i.a. Esperanto-tekston, kaj nova tia faldfolio tre baldaŭ aperos. La funkciuloj en la domo disponas pri adresoj kaj telefonnumeroj de Amsterdamaj Esperantistoj, por ke la gasto-Esperantisto, laŭdezire, trovu samideanon preta por akcepti lin en la urbo, kaj gvidi lin je konvena okazo en la A.F.-domo.

Hazardo estis, ke dum foja interparolo, pasintsomere, kun la direktoro ĝuste pri ĉi tiuj servoj poresperantistaj, la sekretariino avertis nin ke ĵus envenis Esperantistino kun fileto-, ambaŭ parolantaj tiun lingvon. Montriĝis ke efektive Pola sinjorino ĉeestas, kiu trafe ilustris per tiu ĝustmomenta vizito la teorion de miaj vortoj.

La junularcentro celas, per konferencoj, internaciaj ferioj, edukaj vesperoj, k.t.p., akceli la interkompreniĝon inter la junularo tutmonda. La pordo por Esperanto estas malfermita, se sufiĉaj personoj preferantaj la Internacian Lingvon super jam uzata nacia lingvo, partoprenos tiujn aktivajn.

Se vi, vojaĝante en Nederlando, vizitos la domon (adreso: Prinsengracht 263, Amsterdam C.), ne forgesu eluzi la poresperantistajn servojn de la domo: petu pri gvidanto, postulu la faldfoliojn, plenigu la ĝustan registron, menciante ĉiam ke vi parolas Esperanton!

Hans Bakker

LA LINGVA ĤAOSO

Amiko sendis al ni anglalingvan (?) broŝureton pri la 25a Internacia Festivalo de Nuntempa Muziko de la Venecia Bienalo. Kun la Bienalo kaj la Nuntempa Muziko mi ege simpatias, sed la anglalingvo de la broŝureto estas tiel kurioza, ke ni ne povas ne admiri la disvastiĝon de tiu lingvo tra la mondo! En 26 linioj de teksto ni rimarkas tuj 4 erarojn de ortografio, 15 gramatikajn erarojn kaj 6 erarojn de semantiko. Tiu kalkulo efektive ne elĉerpas la bedaŭrindaĵojn, sed aliaj strangaĵoj — de sintakso k.s. — estas malpli facile registreblaj. Por la profito de niaj anglalingvaj legantoj (aliaj eble ne rimarkos la esoteran guston de la frazo) ni permesas al ni citi unu proponon:

"The Festival will be surely a significative artistic manifestation: we hope that it will be a real contact between the public and the art of our time, and a progress towards the contemporary art of whom creates and listens to, that is towards the complete comprehension".

Kiel kontribuo "towards the complete comprehension" (t.e., al la kompleta kompreno), tiu propono estas, ĉu ne, fiasko.

Eminenta brita politikisto lastatempe parolis en la parlamento pri la rimarkinda disvastiĝo de la angla lingvo tra la mondo. Se tia disvastiĝo okazas, estus multe pli kontentige por anglalingvanoj se, anstataŭ kripligi la lingvon de Ŝekspiro, oni uzus Esperanton, kiun oni povas uzi korekte kaj kompreneble se oni dediĉas al ĝia lernado nur onon de la tempo, kiun la tradukisto por la Venecia Festivalo dediĉis al akiro de ridinde neadekvata kaj nesufiĉa "posedo" de la angla lingvo.

NOVA FAKO DE GRAJNOJ EN VENTO

Teknika kaj Scienca Rondo

La subskribanto de ĉi tiu artikolo, en akordo kun s-ano Marcel Erbetta, direktoro de la internacia movado GRAJNOJ EN VENTO, alvokas la Esperantistaron por ekagi en la NATURSCIENCA KAJ TEKNOLOGIA KAMPOJ.

Esperanto estas nun sufiĉe bone envojigita el la literatura vidpunkto, sed estas evidente ke ĝi ankoraŭ ne sufiĉe povis montri siajn eblecojn el la vidpunkto de la scienca interŝanĝado. La nuntempa teknologia mondo postulas tiun kondiĉon por poste akcepti lingvon kiel taŭgan komunikilon.

La nova fako de GRAJNOJ EN VENTO celas daŭrigi kaj ampleksigi la klopodojn jam faritajn en tiu ĉi kampo (ekz. : "Sciencaj Studoj"). Jen la proponata agado :

— La sciencistoj-Esperantistoj povos publikigi rekte la rezultojn de siaj esploroj en Esperanto :

— La aliaj Esperantistoj devos serĉi en la sciencaj medioj de siaj landoj aŭ urboj, taŭgajn publikindajn esploraĵojn, kaj traduki ilin Esperanten;

— En fiksota dato, la partoprenantoj sendos fiksoan kvanton da kopioj (ekz. : 50, per mimeografo) al la subskribanto;

— Li, per la ricevitaj kopioj, eldonos gazetojn enhavantajn 1 kopion el ĉiu partoprenanto;


— Ĉiu partopreninto ricevos 1 (aŭ pli) ekzemplerojn;

— Oni petas al la samideanoj interesitaj, TUJ skribi al la subskribanto, ĉu ili estas pretaj kunlabori. Se kuniĝos sufiĉa nombro, li indikos al ĉiu daton, kvanton da kopioj, kaj aliajn necesajn detalojn por la unua eldono;


— Se la rondo sukcesos, kaj poste aperas pliaj kunlaborantoj, oni povos disbranĉigi ĝin laŭ pli specialigitaj fakoj, ekzemple : kemia, elektroteknika, biologia rondo.

Alberto Barrocas,
Yaguari 2248, Ap. 3,
MONTEVIDEO,
Urugvajo.

(Laŭ eble, aldonu respondkuponon).



La ĉina restoracio en Tivoli, Kopenhago



Kronborg, Helsingor

ALVOKO PRI LA KVARA KONKURSO POR LA PREMIO „COMELLA-BASSOLS”

— Oni donacos 2.000 pesetojn por la plej bona gaja rakonto en Esperanto.

Ĝeneralaj reguloj :

1a — La konkursaĵoj nepre estu maŝinskribitaj, kaj oni sendu 4 ekzemplerojn.

2a — Oni skribu sur ĉiu konkursaĵo pseŭdonimon por kaŝi la identecon de l'aŭtoro, kaj — en aparta koverto — sian nomon kaj adreson kune kun la pseŭdonimo.

3a — La Juĝanta Komisiono, laŭ deziro de S-ro Jacint Comella, (la kreinto de la Premio) konsistas el eksterlandaj samideanoj, membroj de U.E.A., kune kun katalunaj juĝantoj.

4a — La konkursa kotizo, por unu aŭ pluraj rakontoj, estas 10 pesetoj por Hispanujo kaj por eksterlando 4 steloj aŭ 3 respondkuponoj. Por landoj kie ne estas eble sendi la kotizon, la partopreno estas senpaga.

5a — Kiam publikiĝos la Verdikto, samtempe estos sciigata la koncerna Juĝantaro.

6a — La limdato por la ricevo de konkursaĵoj estas la 31a de Julio de 1962.

Oni sendu ĉion laŭ la jena rekomendo :

POR LA KONKURSO "COMELLA-BASSOLS"

S-ro Francisc Vilà - Sekretario.

INSTITUTO DE ESPERANTO

Str/Montcada, 12, BARCELONA (3), Hispanujo.

Novaj Libroj

Duope ricevitaĵn ni recenzas; unuope ricevitaĵn ni nur mencias.

*) ricevebla ĉe U.E.A.

L. Mimó: *PERFEKTECO DE LA ESPERANTAJ VERBOJ*. — Sabadell (Barcelona, Hispanujo), 1961. — 60 paĝoj. 24,5 × 17 cm. Prezo: 50 pesetoj (10 steloj).

„Se ni permesas, ke ĉiu okaza elpensemo kultivu en nia lingvo sian anarĥian spontanecon, tiam ekcedos la gvidaj principoj, fragmentiĝos la penege akirita kohero kaj baldaŭ restos el nia afero nur diseriĝintaj balanciĝoj de ĉiu elementa pasio, kvazaŭ disŝutitaj hidrargeroj tremantaj”. Tiel mi skribis en la Prologo al la *Simpozio pri -atal-ita*, La Laguna, 1961, p. 4, kaj per tiuj vortoj mi volas komenci la recenzon pri la kape citita libro de S-ro Mimó.

Kiam la atismo ekirigis la fantomon de la reformemo, ĝi apenaŭ suspektis kiajn konsekvencojn tiu misaĵo provokos. Kvazaŭ filtriva viruso, la reformemo trapenetras la homojn, kaj aparte plagas tiujn, kiuj estas lingve malfortaj, t.e. tiujn, kiuj ankoraŭ ne finlernis esperanton kaj sekve ne sufiĉe komprenas la logikecon de la zamenhofa sistemo. Inter ĉi tiuj troviĝas S-ro Mimó.

Jam en la unua tekstopaĝo, S-ro M. nerekte malkaŝas, ke li tute ne komprenas, kio estas lingvosistemo. Ĉar tie li stampas, ke li „estis bonŝanca eltrovi la normojn, kiuj pruvas, ke la verbaj elementoj adoptitaj de Zamenhof estas perfektaj” kaj, krome, ke „la de s-ro M. inventitaj normoj tute ne estas arbitraj, sed simple eltiritaj de la naturaj rilatoj, kiujn la verboj mem postulas laŭ la logiko”. T. Pumper (Simpozio cit., p. 179 kaj sekv.) sufiĉe detale klarigis, ke la gramatikaj normoj estas kreaĵoj de la homa spirito kaj ke sekve ili ne troviĝas en la ekstera mondo, sed nur en nia menso. Ni do ja arbitras la normojn kaj ili neniel esprimas naturajn rilatojn de la verboj. La aserto de S-ro M. estas ĝuste la malo de tio, kion instruas bona lingvistika ekzegezo. Des pli en planlingvo, kia estas esperanto.

Due S-ro M. sin esprimas per neadekvata terminaro, hazarde elektita laŭ nacilingvaj ŝablonoj, ŝajne ne ĉiam bone digestitaj. Unu ekzemplo sufiĉu, el inter aliaj. Tra sia tuta verkaĵo S-ro M. parolas pri „help-verboj” aŭ „helpaj verboj”. Nu, G. Waringhien esploris kaj trovis (Simp. cit., p. 296), ke en esperanto ne ekzistas konjugacio kiel romanidoj kaj

ĝermanidoj komprenas tiun nocion, sed serio de kunmetitaj verboformoj; ke tiuj kunmetitaj verboformoj ne kongruas kun la konjugacioj de niaj eŭrop-okcidentaj lingvoj, kaj ke sekve ne estas eble fari tiajn interrespondajn tabelojn, kiajn oni trovas en la lernolibroj (Mi citas libere, kaj tial mankas citiloj). S-ro M. denove faras tiajn tabelojn, kie li konstante parolas pri helpaj verboj. Ŝajne li ankoraŭ ne sukcesis sufiĉe sendepende de siaj nacilingvaj skolastikaĵoj analizi la verbosistemon de esperanto. S-ro M. do manipulas ne-celtaŭgajn nociojn, kaj per tio li faris gravan psiĥologian eraron.

Trie. Ĉar S-ro M. estas fascinita de la fantomo de la atismo, li ne donas lokon en sia libro al la Fundamenta kaj Zamenhofa uzado de la pasivaj verboformoj en aspekta funkcio (eĉ se ŝajne senkonscie li tion faras ĉe certa speco de simplaj verboformoj), kaj tial li baraktas meze de plej strangaj ĵonglaĵoj. En la pasivo li transŝovas la aspektecon de la verboformoj el la participo-ita al la verbo esti, donante al ĝi la formon *ekesti* kaj tiel, anstataŭ la Zamenhofa *La ŝipo estis ŝargita*, li rekomendas *La ŝipo ekestis ŝargita*. Sed ne finiĝas tie liaj fantaziaĵoj; sur la p. 52 oni trovas la frazon *La ŝipo estis ĉesŝargata*. Oni emus kompreni tiun frazon kiel proksimume esprimantan interrompon de la laboro dum la ŝargado de la ŝipo, kiu sekve restis nekompletigita. Sed ne! S-ro M. tuj klarigas, ke tiu frazo estas semantike egala al *La ŝipo ekestis ŝargita*! Kaj sekve li laŭe pludonas: *Esperanto estis ĉeslernata, sed ne ellernata de ili = Esperanto ekestis lernita de ili, sed ne ellernita*. Nun, laŭ tiuj specimenoj, ni povas jam malkaŝi, ke la pluskvamperfektismo (pli en la etimologia, ol en la gramatika senco!) de S-ro M. puŝis lin al kreado de nova atisma sekto, kies oficanta pastro li sin vidas. Nova sekto ja, ĉar liaj proponoj ne harmonias kun tiuj de Isbrucker, Jung kaj aliaj korigoj de la atismo. La sugestio de la mislogika prezentado de la faktoj, kiun enmondigis la reformistoj, devigas S-ro M. ĉiam serĉi ankoraŭ „pli logikan” plibonigon. Kaj tiel, atakita de plilogikema malstabileco, li nur kontribuas malproksimiĝon for de la Fundamento kaj de la zamenhofa tradicio.

Kvare. S-ro M. plumbuŝe laŭdas Zamenhof kaj eĉ dediĉas sian libron al lia genio, kiu „kreis lingvon logikan kaj genie simplan” (p. 7), kaj indikas la respekton ŝuldatan al la Fundamento; sed tuj s-ro M. esprimas sian malplaĉon por la maniero kiel Zamenhof manipulis sian inventaĵon, kaj la tuta Mimó doktrino estas nur montrado, ke tiu lingva geniulo dum sia tuta vivo uzadis sian lingvon ne korekte, ne ĝuste, ne logike.... kaj ke la ekzemplojn de la Fundamento oni povas ignori. Nia Simpozio sufiĉe pruvis, per lingvosciencia kontrastado, ke tiu omaĝa sinteno de la atismanoj estas nur „la fermentaĵo de la Fariseoj”. La Fundamento estas la parto de nia lingvo, kiun neniu povas forigi. Ĉio cetera povas pli aŭ malpli flukti. Sed kontraŭ la Fundamento ĉiuj opinioj devas aŭ cedi, aŭ memvole ekseperantistiĝi. Do la atismanoj scias, ke per sia kontraŭfundamenta agado ili minacas detrui nian solan eblan gvidilon, la zamenhofan lingvouzadon, kaj nian konstitucian leĝon, la Fundamenton. „Sed estas nenio kovrita, kio ne estos elmontrita; kaj nenio kaŝita, kio ne estos sciata” (Luk. XII, 2).

Mi povus daŭrigi la komentadon pri asertoj kiel „nur per simetrio, formo amata de la Vivo, oni povas eviti ĉian konfuzon” (p. 9) kaj montri, ke lia simetriismo kondukas al plej strangaj konsekvencoj (kp. Simp., p. 175 kaj sekv.); aŭ pri la miskomprenita cito el Mikami (p. 52) kaj la intence miskompreniga el Kalocsay (p. 53) — ĉar komparu liajn du kontribuadojn al la Simpozio kaj tiun en „Esperantologio”, II, 2 —; aŭ pri.... sed, ĉu utile? „Ekzistas tute ordinariaj gramatikaj faktoj, kies kernon ne ĉiuj sondiloj povas atingi” mi skribis en la citita Simpozio, p. 312. Cetere, mi bone povas kompreni, ke kiam debutatan aŭtoron apogas la ŝato de tiel prestiĝaj nomoj kiel Butler, Haferkorn, Jung, Lippmann, Støp-Bowitz k.a. lia pravokredo povas fariĝi pli lule insista, pli obtuze obstina, ol la scienca demonstrado de lia mispaŝo..

En la citita Simpozio ni montris, ke la Fundamento kaj la zamenhofa tradicio konsistigas harmonian, unuecan sistemon, kaj ke ĉiu oponento al tiu sistemo montras al malsama direkto. Ilin nur ligas ilia kontraŭfundamenteco, sed nenia formulita teoria pravigo. Nun venas S-ro M. kun novaj „plibonigoj”, kiuj fakte estas nur secela padelado en la spirita marĉo de lingvaj superstiĉoj, antaŭjuĝoj kaj blindumiĝoj, kiuj mirage hantas la reformemulojn.

Paradokse tamen, la libro donas, kvankam negativan, tamen valoran instruon, eĉ se ne laŭ la vojo celita de la aŭtoro: ĝi kontribuas novan elementon de diseco al la atisma tendaro, kiu tiel ĉiuforte pli kaj pli disruiniĝas en malsistemiĝon kaj plue plifortigas sian teorion vakecon. Tiun

negativan instruon, kiu forte pravigas la unuecon ĉirkaŭ la Zamenhofa tradicio, oni povas agnoski al la literaturo de S-ro M.

Resume, la libro de S-ro M. estas diletantaĵo kontraŭfundamenta kaj sekve kontraŭesperanta. Mi do povas nur bedaŭri ĝian aperon. Tamen ĉe la fino restas al mi averti, ke mi pozitive estimas la personon de la aŭtoro kaj ke mia recenzo celas malrekomendi nur la ideojn de li eksterigitajn, kaj nur pro tio, ke ili grave atencas la unuecon kaj la zamenhofan spiriton de nia lingvo. Por mi estus vere komforta, tute senĝena, "neŭtrale" silenti, aŭ, kiel oni diras hispane, rigardi la taŭreludojn de malantaŭ la barilo. Sed se ni vere amas nian aferon, ni devas ĝin defendi kontraŭ ĉio, kio en ĝi estas malinda. Kaj la libro de S-ro M. imperative puŝis min en la arenon, eĉ se mi devis tion fari kun forta amaro en la buŝo.

J. Régulo Pérez

**Edwin de Kock: OMBROJ DE LA KVARA DIMENSIO. Eld. Beletraj Kajeroj de Stafeto, J. Régulo, La Laguna, 1961. 160 p. 18,5 × 12 cm, Prezo: us. dol. 1,50 (20 steloj)*

El *Ombroj de la Kvara Dimensio* oni konstatus, eĉ se oni estus leginta nenion alian de Edwin de Kock, ke li estas unu el la Esperantaj poetoj kiujn oni devas konsideri serioze, kaj ke lia verko probable influos la evoluon de nia poezio.

Kiel la granda plimulto el niaj poetoj, de Kock apartenas al la romantika skolo, unu el kies karakterizaj trajtoj estas la konvinko, ke nenio gravas krom la individua emocio de la poeto: la centro kaj deirpunkto de lia poezio.

Ĉiuj poemoj en ĉi tiu volumo do havas, kiel kernon, la sinesploran kontemplon de la poeto; oni neniam sentas, ke de Kock staras flanke de, aŭ super, la enhavo de siaj poemoj. Kompreneble, tiu sinteno kunportas certajn danĝerojn; ekzemple, la riskon fali en la narcisismon — kaj tre multaj eŭropaj poetoj ne sciis tute eviti ĝin. De Kock, en kelkaj lokoj, ŝajnas proksimiĝi al la narcisismo; ekzemple, en la poemo "Pri la estonteco de miaj poemoj", li preskaŭ komprenigas, ke la ruiniĝo de la civilizacio estas por li tolerebla, ĉar postvivis ĝin liaj poemoj. Tamen, lia admirinda imagoforto esperigas, ke li sukcesos eviti tiun kaptilon.

Imagoforto: jen kerno de lia talento. Tiu imago, kiu perceptas neviditajn similecojn kaj ilin evidentigas per freŝaj kaj trafaj metaforoj, kaj per empatio kaptas kaj prezentas al ni la esencon de homoj kaj bestoj, de ŝtonoj kaj nuboj, kaj ilian signifon por la poeto: tiu imago, kiu faras el de Kock valora kaj grava poeto, malgraŭ kelkaj ne tute maturaj flankoj. Jen kelkaj hazarde elektitaj ekzemploj:

*La mateno tra makzeloj ruĝaj
glutis la urbegon. Zumis tiam
sub la ventra bluo de l'ĉielo
homoj kiel pertorbitaj muŝoj...*

*Solvoleke min konsumas
flamo de la belo.....*

*La vintrobesto glacispire
stratojn kaj en kortoj snufas...*

*..... la nigra vato de la nokto
ĉirkaŭ mian kapon vindis sin.....*

*En opala lumo de l'mateno
tra kiu lante ni lanugis suben...*

La plimulto el la poemoj traktas la suferojn, ĝojojn, mirdemandojn de la poeto, kaj preskaŭ ĉiuj el ili sukcesas komuniki al ni la emociion el kiu ili kreigis. Jen kaj jen li proksimiĝas al la sentimentalismo (ekzemple, ĉe la fino de "Odo al Dio"); kelkloke mi sentas, ke li tro streĉis la imagon por alpingli frapan metaforon aŭ epiteton; sed entute li prezentas bukedon da liriko, kiuj igas nin konscii pli klare ol antaŭe la misteron de nia interna mondo kaj la belon de la ekstera.

Krome, grandan parton de la libro okupas epopeo, "La Konflikto de la Epokoj", kiu, simile al *Paradizo Perdita* de Milton, celas klarigi la originon de la malbono, kaj pravigi al la homo la farojn de Dio. Ĝi nepre pensigas pri la epopeo de Milton, kaj de Kock eĉ invitas komparon per kelkaj versoj kiuj eĉas la komencajn versojn de la angla poemo. Eĉ pli: kaj Milton kaj de Kock faras la saman eraron, lasante Dion argumenti pri siaj ĉioscio kaj ĉiopovo kvazaŭ li estus ne tre subtila pastro; kaj same kiel Milton, de Kock ne sukcesas pravigi la farojn de Dio.

Mi tamen komparon kun *Paradizo Perdita* ne volas fari: la poemo rajtas esti aprezata sendepende. Oni povas diri tuj, ke la koncepto estas grandioza, kaj ke ĝi mirige evitas la batoson. De Kock sukcesas transiri glate, konvinke kaj bele de homa pensero ĝis tutuniversa kaj tuttempa bildo; kaj ĉie li juvelas siajn versojn per frazoj memorindaj, eĉ neforgeseblaj. Ĝi estas ambicia poemo de ambicia poeto; leginte ĝin, mi konvinkiĝis, ke li ne celis tro alte.

Tio ne signifas, ke oni ne sentas kelkajn dubetojn. De Kock havas tre muzikan oreton — li tion pravas sur ĉiu paĝo. Tamen, eble en unu elemento de la poezio li ankoraŭ ne tute maturiĝis: la ritmo. La ritmo de ĉiu poemo estas la trokea, kiun de Kock opinias la sola natura ritmo por Esperanto: li prezentas tezon pri "Mia Prozodio" en la fino de la volumo. Ke Esperanto estas fundamente trokea kaj amfibra lingvo oni devas konsenti; sed oni rajtas atentigi, ke poeto bezonas eksterordinaran lertecon por eviti la monotonecon se li ĉiam, aŭ tre ofte, uzas baze nur trokean metron. Laŭ mia orelo, de Kock ne ĉiam evitas tiun monotonecon; lia variigo de la ritmo ankoraŭ ne sukcesas eviti la danĝeron — kiun, cetere, li mem konscias. Ĉiukaze, la pensfino aŭ penspaŭzo en liaj versoj tro ofte koincidas kun la fino de la verso: liaj trokeaj blankversoj memorigas anglon pri la

blankversoj de Gorboduc. Mi suspektas, ke li tro facile kaj flue verkas trokeajn versojn, kaj ke li profitus, eksperimentante per aliaj metroj. Li tiam preskaŭ certe antaŭenirus al versoj analogiaj al tiuj, ekzemple, de Marlowe. Mi tamen emfazu, ke tiu epopeo estas grava, bela, impona poemo, kiu kreas en sia Esperanta speco novan kriterion.

Prave, de Kock profitas multajn licencojn; ĉiuj ŝajnas akceptindaj krom tri: *antaŭ* (anst. *antaŭ ol*); *post* (anst. *post kiam*); kaj *post ol* (anst. *post kiam*). Tiujn mi opinias ne akceptindaj precipe pro la fakto, ke ili stumbligas la leganton, kaj devigas al li relegi la version por kontroli la sencon.

"La Konflikto de la Epokoj" ne estas finita. Bedaŭrinde: ĝi nepre meritas kompletigon. Kiel Marjorie Boulton en sia interesa Antaŭparolo, mi kore esperas, ke de Kock finverkos ĝin: ĝi povos fariĝi unu el la klasikaĵoj de nia lingvo.

L. N. M. Newell

* *Jugoslavia poemaro: REEĤOJ. Stafeto, Beletraj Kajeroj 8. Eld. J. Régulo, La Laguna, 1961. 111 p. 19 × 12 cm. Prezo: us. dol. 1 (13 steloj).*

Jen mi bonvenigas la unuan idon — tion atestas la Prologo de Marinko Gjivoje — de mia "Esperanta antologio". Kaj vere fieriga ido ĝi estas. Ĉar en la "E.A." aperis nur unu poeto el Jugoslavio, niaj tieaj amikoj decidis manifesti la pli larĝajn bordojn de sia poezia kulturo.

19 esperantaj poetoj el unu lando! Efektive konsterna manifestacio. En tia riĉeco kaj abundo oni povas nur miri, ke tamen en tiu lando ankoraŭ ne aperis unu poeto-giganto. Se aperos tia, li certe donos tian svingon al nia jugoslavia kreado, kian oni apenaŭ povas imagi. Vanĉik eble devis esti tia giganto, sed verŝajne al li mankis impeto multe krei: ĉi tie estas reprezentaj poemoj liaj, kiuj ĝojigis min kiel novbakitan esperantiston en la fruaj kajeroj de "Literatura mondo" (Tria periodo); tio ne malvalidigas ilin — tute male — sed kien forvaporiĝis la krepotenco, kiu siatempe naskis ilin? Certe sur aliajn kampojn de la agado esperantista kaj privata. Velebit estas pli produktiva, estas tre kompetenta versisto, sed mankas al li, laŭ la ĝis nun prezentitaj specimenoj, la profundo kaj potenco necesaj al tiu, kiu multos kaj skulptos nian kulturon. En tiu ĉi antologio mankas giganto, sed troviĝas... amasmovado de poetoj, kaj ankaŭ tio estas grava kaj salutinda!

La plej ekscita kaj esprimiva poemo en la kolekto estas sendube la pli longa sola kontribuo de Antonija Albert: "Koloroj". Ĉi tie ni trovas vizion, delikatecon, sentemon, kaj vere fajnan kapablon sugestii per ĉiuj rimedoj de la vortoj kaj la... silentoj. Se aliaj ŝiaj poemoj estas tiaj, mi povus legi ilin ĉiutage dum mia vivo. Oni eksentus, ke ŝi povus esti gigantino — sed tiom da aliaj faktoroj influas. Ekzem-

ple — ĉu impertinente starigi la demandon? — ĉu pro ŝia aĝo jam estas tro malfrue? Kaj tamen... mi tre deziras legi aliajn tiajn verkojn. La plenan efikon de la poemo oni ricevas nur el la tuto, sed permesu citi almenaŭ la unuajn versojn:

La ruĝa virino

vivas hodiaŭ,
sen sperto —
sen celo —

"Rememoroj?" — "Respondeco?"

"Balasto!" grakas

la arda, sensovibra VIRINO.

La ruĝa viro

vivas de momento al momento.

Punkto de la nuno,

portata, tirata de la Fato, kiel

ŝtoneto de la rivero —

fine: puŝata en la maron de la pasio.

La naiva, nekomplika VIRO.

Alia elstara poemo en tiu ĉi volumeto havas tute alian naturon. "Ĉiu homo enhavas en si unu poemon" oni povas diri sed malofte tiuj, kiuj ne kutimiĝis verki poemojn, sukcesas surpaperigi ĝin. Tibor Sekelj estas unu el la malmultaj. En "Mi vizitas mian farmon" la esploristo kaj sentema praktikulo verkis sian poemon, kaj la rezulto estas bela kaj bonega. Mi diskutis kun Sekelj la poemon, kaj ŝajnas, ke li konsentas pri mia verdikto; nenio malhelpas, ke li verku aliajn poemojn; nenio malhelpas, ke ankaŭ ili estu bonaj, sed poeto li unuavice ne estas, kaj mi havas la senton, ke "Mi vizitas mian farmon" estas lia poezia testamento — per kiu li tamen akiris por si eternan lokon inter la *legotaj* esperantaj poetoj.

Tria elstara talento estas Jakobo Stefanĉič, kaj denove aliaspeca. Apenaŭ mi eklegis liajn verkojn, jen mi konstatis, ke ĉi tiu estas maturulo; kontrolo en la biografioj (cetere, tre laŭdinda aldono al la volumo) montris, ke li naskiĝis en 1885, Montriĝis plue, ke li havas 4,000 versojn en manuskripto; se mi juĝas laŭ la 92 specimenaj ĉi tie prezentitaj, tiuj versoj meritas pli larĝan diskonigon.

Ján Labáth estas poeto ankaŭ en la slovaka lingvo, kaj lia "Septembra elegio" plene pravas lian kapablon. La du aliaj, kvankam laŭ mia opinio malpli sukcesaj, apogas la deziron legi aliajn verkojn de tre promesplena talento.

El la aliaj, neniuj falas sub kontentiga nivelo. Damjan Vahen-Svatov havas grandan ĉarmon; ĉarma, rektesprima kaj senartifika estas Nedeljka Subotić, ĉe kiu plej sukcesas la pli persona "Frumateno"; en "Deziron", Margarethe-Greta Stoll atingas japanecan delikaton: ŝiaj aliaj poemoj ŝajnas malpli sukcesaj, efektive minoraj; la eleganta bagatelo de Gvozden Sredić tamen sonigas aŭtentikan noton; la tono de Bo Zorović estas agrable sprita, kaj memorigas — kiel li mem konstatis — pri Kalocsay en ties simila humoro; Vesná Skaljer-Race

estas iom supraĵa, sed en "Plendo" kortuŝas noto de sincero kaj realo; Duro Rašan havas interesan koncepton, sed lingve la verko estas nesufiĉe belflua kaj potenca; Franjo Homar prenas lokon apud tiuj malmultaj, kiuj sukcesis verki trafe pri Esperanto; Živanović estas kompetenta ver-sisto, al kiu ŝajne mankas premanta inspiro.

Antologioj — kiel mi mem spertis — estas malfacile kompileblaj. Foje la materialo estas tro multa, kaj la elektado el riĉaĵoj estas frenezige neebila; foje la poetoj estas tro "maldensaj sur la tero", kiel diras angloj pri tetraoj, kaj oni devas enŝtopi tro multajn feblaĵojn. "Reeĥoj" bone navigas inter tiuj rokoj, kaj entute ni havas volumon, kiu donos plezuron al ĉiu, kaj kiu denove mirigas nin pri la alta kulturnivelo de la jugoslavia esperantistaro.

W. Auld

ESPERANTO EN KOMERCO. *Raportaro en kvin lingvoj: Esperanto, angla, franca, hispana, germana.* Eld.: *Esperanto-Rondo Crailsheim-Germanujo*, 1962. 105p. 20.6 × 14.5 cm. Prezo: gm. 1,50 (5 steloj).

Kuraĝigite de estraranoj de UEA kaj GEA, Bruno Vogelmann komencis kolekti raportojn de komercaj entreprenoj, kiuj en siaj eksterlandaj rilatoj uzas Esperanton. Celo de tiu klopodo estis pruvi per originalaj raportoj el la praktiko, ke Esperanto estas jam nuntempe fakte uzata kaj montras evidentajn avantaĝojn por internaciaj rilatoj. La raportoj devenas de grandaj kaj malgrandaj firmaoj, inter ili FIAT, GEVAERT, la YTONG-koncerno, scienca instituto kaj la foiro de Barcelono. Ili venis el la tuta mondo, el Eŭropo, Usono, Sud-ameriko, Ĉinuĵo, Japanujo. Pro manko de spaco estas presitaj nur la plej gravaj frazoj el ĉiu raporto. Ĉiu raporto estas presita en Esperanto, angla, franca, hispana kaj germana lingvoj. Tiel la raportaro estas grava dokumento kaj varbilo. Sinjoro E. L. M. Wensing, direktoro de N.V. Philips gloeilampen fabrieken, Medical Apparatus Division, Eindhoven, Nederlando, verkis la enkondukan paĝon.

La esperantistaro havas en tiu raportaro gravan dokumenton por prezenti al registaroj, oficejoj, komercaj trafikaj kaj aliaj entreprenoj kaj institucioj la taŭgecon kaj la jam nun eblan valorigon de Esperanto.

La prezo estas nur parto de la veraj, tre altaj, kostoj, sed noblaj donacoj de amikoj de Esperanto kaj financa helpo de la Esperanto-Rondo Crailsheim ebligis la moderan prezon de gm 1,50.

VIVU LENINISMO. 1960. 102p. 20 × 14 cm. Prezo 1 gld. (4 steloj). *Maŭ Zedong: PRI PRAKTIKO.* 1961. 22p. 18.3 × 1 3cm. Prezo: bind. 0,70 gld. (3 steloj), broŝ. 0,35 gld. (1,3 steloj). *Maŭ Zedong: RAPORTO AL LA DUA PLENA SESIO DE LA SEPA CENTRA*

KOMITATO DE LA KOMUNISTA PARTIO DE ĈINIO. 1961. 28p. 19 × 13 cm. Prezo: 0,70 (3 steloj). **LAŬDEZIRA KALKULO DE KENNEDY.** 1962. 25p. 18.5 × 13 cm. **LA OKCIDENTA ĈAMBRO.** 1961. *Bildoj de Van Suhuj, teksto de Hong Zengling, traduko de Laŭlum.* 88p. 13 × 17.5 cm. Prezo 0,75 gld. (3 steloj). **RAKONTOJ PRI FANTOM-SPITANTOJ.** 1961. *Kompilita de la Literatura Instituto de la Ĉina Akademio de Sciencoj.* 98p. 18,5 × 12 cm. Prezo: 1,25 gld. (5 steloj). **KARPETOJ TRANSSALTIS LA DRAKORDON.** 1961. *Bildoj de Jang Sanzi kaj Ding Jonglin, teksto de Gin Gin, Traduko de T.H.* 32p. 20 × 18 cm. **KNABINO KAJ GAROLO.** 1962. *Versoj de Liu Ĝaŭlin, bildoj de Ĉeng Ŝifa, traduko de Laŭlum.* 38p. 25 × 17 cm. *Ĉiuj titoloj eldonitaj de Ĉina Esperanto-Ligo, Pekino.*

Jen ok libroj eldonitaj, evidente kun ŝtata subvencio, dum la lastaj 18 monatoj en Ĉinuĵo. Per tio montriĝas, ke la ĉina registaro estas unu el tiuj, kiuj rekonas la praktikan uzindecon de nia lingvo, kaj estas tre naive plendi, kiel tion jam faris de tempo al tempo iuj nekomunistoj, ke duono el la supraj titoloj celas disvastigi la konceptojn kaj politikajn ideojn de la ĉina registaro! Nu, kompreneble! — tio estas funkcio de ĉiu registaro; ankaŭ la registaro de mia lando faras simile, sed ankoraŭ ne en Esperanto, kiu por ĝi ne ekzistas oficiale. Unu el la supraj verkoj forte atakas la Prezidanton de Usono. Mi tion eble bedaŭras, sed — kial mi ne povas legi respondon en la sama lingvo? Jen mi povas legi verkojn de Lenin kaj Maŭ Zedong en Esperanto — kial ne ankaŭ verkojn de okcidentaj pensuloj kaj politikistoj? La ĉina registaro rekonas mian ekziston kiel esperantiston, kaj rekonas, ke mia lingvo estas serioza afero — la okcidentaj esperantistoj, anstataŭ plendi pri la ĉinoj, atingu simile bonajn rezultojn ĉe sia propra registaro!

La koncernaj kvar libroj estas lingve bonegaj, sed ilia enhavo tre certe malplaĉos al tiuj, kiuj ne akceptas la politikajn konceptojn, sur kiuj ili baziĝas.

Tamen, krom la politikaj eldonaĵoj, la ĉinoj eldonas en nia lingvo ankaŭ treege belajn bild- kaj rakontlibrojn, en kiuj tute mankas nuancoj de politiko. Nu, ne tute: la libro *Rakontoj pri fantom-spitantoj* (anekdotoj el la antikva Ĉinuĵo) enhavas enkondukon, kiu donas politikan alegoron al tiuj naivaj popolhistorioj el la malnova tempo, kaj estas bone, ke la okcidenta leganto estu avertita pri tio. La rakontoj mem estas pli interesaj ol oni eble supozus laŭ la titolo; ili estas tute mallongaj, kaj la ilustraĵoj estas klasike elegantaj, per nigra linio sur flava fono. *La okcidenta ĉambro* estas fama dramo de Vang Ŝifu (1279-1368 p.k.), kiun oni ĉi tie prezentas en formo de bildrakonto kun mallonga subbilda teksto. Denove la delikata linio de la desegnaĵoj kaj la fajna detaleco

de la bildoj ege plaĉas. *Karpetoj transsaltis la drakpordon* estas bildrakonto por infanoj, kaj ĉi-foje la bildoj estas koloritaj kaj tre similas al kartunfilmo. Ĉarma verketo. En *Knabino kaj garolo Ĉeng Sifa* (kiu ilustris la *Rakontojn pri fantom-spitantoj*) ĉi-foje per klasikecaj akvareloj ilustras popolan versrakonton, el kiu jen specimeno:

*Ce Jufu-river' en vilaĝeto vivis
Patrin' malriĉa kun orfin' mizera.
La patro, ŝtonhakisto, vivon trivis
Ĝis morto en povreco malmodera.
Nur pajldomaĉon li postlasis al l'edzino.
Kaj eta tiam estis la filino,
Sed tre lerta estis ŝi en teks' kaj ŝpino.*

(Por tiuj, kiuj ne konas la vorton, trivi signifas uzkonsumi.)

La politikajn verkojn legos tiuj, kiuj interesiĝas pri la temo. La tri libretojn, kiuj evitas la politikon mi senrezerve rekomendas al ĉiuj, kiuj amas belajn artaĵojn kaj sukplenan, sed esence simplan, lingvaĵon.

W. Auld

Ernst Olsson: KREDO, FLOROJ, DINAMITO: biografia verketo pri Sankta Birgitta, Karl von Linné, kaj Alfred Nobel. Eldona Societo Esperanto, Malmö, 1961. 79 p. 19 × 12 cm. Prezo: bind. sv. kr. 8: 50 (22,4 steloj; broŝ. sv. kr. 4: 75 12,5 steloj).

Kiu vidus nur la nudan titolon de ĉi tiu libreto eble mirus, ĉu li renkontis ian romanon anarĥistan. Sed la vero estas pli proza, tamen pli interesa. Sveda fizikisto, D-ro Olsson, verkis antaŭ sia morto la plejparton de granda libro pri famaj svedoj. Pro limigitaj rimedoj, oni eldonas el ĝi nur tri ĉapitrojn, redaktitaj kaj prilaboritaj de Gösta Henriksson, sed la specimenoj estas tiel interesaj ke oni esperu vidi post nelonge la restaĵon.

La tri personoj elektitaj estas multe malsamaj, sed ili havas komune inter si unu trajton, kiu estas volo — volo ofte celanta laŭ vojoj nekutimaj, sed ĉiam forta kaj daŭra. La volo de Birgitta (1303—1373) celas ordigi kaj organizi aferojn. Filino de la nobelaro, tre frue edziniĝinta, kaj multnaskinta, ŝi


mastrumis nobelan domon, poste reĝan kortegon, kaj fine ŝi provis mastrumi kaj reĝojn kaj papojn, ĉiujn laŭ ordonoj diaj ricevitaj dum vizioj. Ŝiaj pilgrimoj kaj bonfaroj, kun ŝiaj provoj fondi monaĥinan kongregacion, donis reputacion de piulino, sed ŝiaj viziaj revelacioj estis suspektataj ĝis fine ŝi triumfe defendis ilin antaŭ tribunalo. La volo dia estis montrita al ŝi per vizioj, kaj ŝi ne hezitis ĝin transdoni.

Al Linnaeus (1707-1778) oni prave asignas pli ol duonon de la tuta libro. La celo de lia volo estis teoria sistemigo, unue de la floroj kaj la regno planta, poste de la regnoj besta kaj minerala, kaj fine eĉ de la regno dia. Filo de malriĉa pastro, li ne ŝatis lernejon, sed multe studis la florojn. Tra la vivo li iom post iom akiris por si patronojn, sed estis nur post multaj ĉagrenigoj ke li fine akiris taŭgan postenon. Intertempe li vojaĝis por kolekti florojn en Laponujo, kaj lasis Svedujon por iri al Nederlando kie finfine li trovis eldonon por siaj verkoj kaj rekonon por siaj meritoj. Sed tie li sopiris al Svedujo kie li lasis fianĉinon, kaj li neniam lernis paroli la nederlandan aŭ iun ajn fremdan lingvon, sed uzis ian kriplan latinaĉon. Do li reiris al Svedujo, kaj post multaj klopodoj iĝis profesoro kaj daŭrigis sian sciencan laboron. Lia kapablo faris por si vojon tra malhelpoj.

La volo de Alfred Nobel (1833-1896) celis al eksplodaĵoj, precipe al nitroglicerino, kaj daŭrigis la klopodojn de lia patro trovi taŭgajn metodojn uzi praktike tiun fortegan eksplodaĵon. Lia tuta vivo estis iamaniere apendico al serio da eksperimentoj kaj inventaĵoj, kiuj donis al li grandegan riĉon, kaj mortinte li transdonis ĝin al la homaro sub la ĉiekonata nomo de la nobelpremioj.

Lingve la libro estas tute celtaŭga, uzante rektajn senpretendajn frazojn por montri la personojn priskribatajn pli ol la literaturajn meritojn de la verkistoj. Kvankam la pliparto estas pri sciencistoj, tamen oni traktas pli la travivaĵojn ol la teoriojn, kaj leganto nesciencista nepre ĝojos pro tio.

F. M. Dunn



La ĉefenirejo de la Kongresejo, Kopenhago

Tra la Mondo

Aŭstrujo

● **Turisman broŝureton "Malsupra Aŭstrio"** eldonis kun enmetita klarigfolio en Esperanto Landesfremdenverkehrsamt Niederösterreich, Wien I, Herrengasse 13, Aŭstrujo. Reklamfolio "Kara Esperantisto" eldonis ankaŭ la ĉefinstituto de Erste Österreichische Spar-casse, Wien I, Graben 21.

Belgujo

● **Esperanto-Semajnfino** sub la aŭspicioj de la Belga Esperanto Fervojista Asocio okazis en Brugge la 24an kaj 25an de februaro 1962. Inter la 95 gepartoprenintoj estis reprezentitaj ĉiuj esperanto-organizaĵoj de Belgujo. La kulmina punkto de la semajnfino estis forumo pri unueca agado por Esperanto en Belgujo. Neniam antaŭe en Belgujo okazis tia lerniga, interesa kaj bone gvidata kontakto inter pluraj eminentaj aktivuloj el la plej diversaj esperanto-organizaĵoj. Konklude, oni konstatis, ke devas esti organizata en tuja estonteco unueca agado por prilabori la lernejan kaj radian terenojn.

Britujo

● **Aperis la unua kajero de "La Reala Vivo"**, organo de Brita Esperanto-Humanistaro. Bele multobligita kun presita kovrilo kaj interesaj artikoloj. Interesatoj sin turnu al: J. M. Garnett, 4 Cecil Road, CHEAM, Surrey, Anglujo.

Ĉeĥoslovakio

● **Okaze de 55-jara ekzistado de Esperanto-movado en la banurbo Teplice**, la klubo Božena Něcová aranĝos je la 15a de majo ekspozicion kun letervespero. La klubanoj atendas multajn salutleterojn kaj ilustritajn poŝtkartojn: Berthold Guttmann, Del. de UEA, Dubí 2 u Teplic, ĈSR.

Francujo

● **Radio-Lille** disaŭdigis duan elsendon pri la movado en Norda Francujo kaj Belgujo. Partoprenis la intervjuon belga, brita kaj franca esperantistoj.

● **Bulonjo-apud-mar** estos la kadro de internacia renkontiĝo, kiu okazos la 12an kaj la 13an de majo, kunlabore kun belgaj, britaj kaj nederlandaj grupoj. Informejo: Esperanto, 2 Rue Flahaut, Boulogne-sur-mer (Pas de Calais).

● **Okaze de la "esperantista tago"**, estraranoj de la Internacia Komerca Foiro de Lille akceptis la 22an de aprilo gesamideanojn el la tuta regiono. I.a., la ĉeestintoj debatis pri U.E.F. kaj la unua — kaj sukcesa — semajnfino en Bruĝo (Belgujo).

● **La infan-vilaĝo de Busigny** estis la temo de ses-paĝa ilustrita artikolo, kiu aperis en la revuo "Lectures pour Tous", kun pluraj mencioj pri la esperantista agado de la direktoro-fondinto, S-ro Gilbert Cotteau. En la sama numero, estis letero de UEA-delegito

pri Vinoba Bhave kaj esperanto.

● **Profesoro Taro Nišiumi**, el Tokio (Japanujo) profitis sian restadon en Francujo por kontakti lokajn klubojn kaj interese prelegi pri sia lando.

● **Okaze de la Florfoiro**, (27-IV-7-V) la klubo de Valenciennes invitis esperanto-amikojn el Düren (Germanujo). La gazetaro kaj la urba konsilantaro favoris tiun-ĉi iniciaton.

● **La gazeto "Jeunes Anneés - Magazine"** organizis inter siaj junaj legantoj konkurson pri esperanto.

● **Okaze de la Internacia Foiro de Nice** en marto 1962 la administracio disponigis al la lokaj esperantistoj tre favoran spacon por stando ĉe la enirejo al la sekcio "Turismo", la plej eleganta parto de la halo. La foiron vizitas proks. 200,000 personoj. Ĉi-jare estis reprezentitaj 26 nacioj, inter kiuj la reprezentantoj aŭstra kaj okcident-germana distribuis esperantlingvajn varbbruŝurojn. La societo "Benedictine" en Fécamp (Normandie) sendis materialon por la stando, el kiu plej elokventa estis kvinlingva faldfolio "Le tourisme international — c'est l'affaire de l'Esperanto"; ĝi kunsendis ankaŭ specimenojn de sia mondfama likvoro.

● **La 31a Normanda Kongreso** okazos la 5an kaj 6an de majo en Rouen. Anoncu vin al: s-ro Buisson, 10 rue François Blanchard, La Maine, Maromme (Seine Maritime), Francujo.

Germanujo

● **Dua Esperanto-prospekto pri Wuppertal**. Pro la eksterordinara sukceso en la varbado kaj informado pri Wuppertal per Esperanto-prospekto, la gazetar- kaj varboficejo de tiu urbo ĵus eldonis tute novan Esperanto-prospekton. Ĝi estas senkoste havebla ĉe Presse- und Werbeamt Wuppertal, Germanujo. Oni nepre petu la prospekton esperantlingve. Pri Düsseldorf aperis varbbruŝureto kun esperanta aldono ĉe: Werbe- und Verkehrsamt der Stadt Düsseldorf, Ehrenhof 3.

Grekujo

● **En Thessaloniki**, ĉefurbo de Norda Grekujo, ekflamis vigla Esperantomovado dank' al aktiveco de la tiea Esperanta Ligo kaj la interesiĝo pri Esperanto de la Direkcio de la tiea Pedagogia Akademio. Ĉiuj lernantoj de la instituto sekvas intensajn kursojn kun 80 partoprenantoj.

Hungarujo

● **Al Radio Budapest** skribu, ke vi tre simpatias kun la hungara popolo kaj petas regulajn sciigojn pri ties vivo kaj kulturo en Esperanto. Ne prokrastu!

Jugoslavio

● **Fondiĝis Jugoslavia Esperanto-Instituto**. La 28an de januaro fondiĝis Jugoslavia Esperanto-Instituto kun sidejo en Beograd (Teraziĝe 42). Direktoro de la Instituto fariĝis Prof. D-ro Boja Popović, ĝenerala sekretario de ISAE. Por efektiviĝi siajn taskojn la

Instituto havas kvar fakojn: por lingvistiko, por instruado, por literaturo kaj por historio. La Instituto deziras kunlabori kun ĉiuj similaj institucioj en aliaj landoj kaj kun unuopuloj, kiuj okupiĝas pri la samaj problemoj kaj deziras interŝanĝi spertojn kaj materialon. Pro tio ĝi petas kontakton kun ĉiuj interesatoj. La Instituto planas eldonadon de periodaĵo.

Nederlando

● **Esperanto-fako de la Mondkoalicio kontraŭ Vivisekcio** estas starigita. La Mondkoalicio eldonas siajn flugfoliojn ankaŭ en Esperanto. Oni petas la kunlaboradon de ĉiuj, kiuj subtenas la celojn kontraŭvivisekciajn. Adreso: Hoogvlietstr. 18, Hago, Nederlando.

Svislando

● **Esperanta poŝtstampo**. Kiel ni raportis en nia lasta numero, la svisa poŝto ĉi-jare uzas specialan stampon kun Esperanta teksto. Dum aprilo tio okazis en Glarus kaj Aarau; en majo estos en Greschen So kaj Schaffhausen 1; en junio en Langenthal kaj Baden. Interesatoj povas sendi du aŭ pli adresitajn, malfermitajn respondkovertojn kaj 2 internaciajn respondkuponojn (aŭ 3 stelojn) po du ĝis kvar respondkovertoj al: J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7, Zürich 57.

ESPERANTISTA VIVO

Naskiĝoj

Cardoso. La 2an de februaro 1962 naskiĝis al Paulo Amorim Cardoso kaj Mires Meireles Cardoso en Fortaleza, Ceará, Brazilo, filo nomita Karlo, frato de Beatrico, Altair kaj Paulo.

Imbert. Al ges-anoj Imbert en Zagreb naskiĝis filo Michel.

da Silva. Al Hilda Sylvia kaj Alvacy Plauda da Silva en Canela, Brazilo, naskiĝis filo Marcelo.

Geedziĝo

Larsen-Berry. F-ino Colleen M. Berry, Havelock North, Novzelando, al s-ro Jens Larsen, Grinsted, Danlando, je la 9a de decembro 1961.

NEKROLOGO

Boušek. En Praha mortis je la 13a de januaro 1962 Hynek Karel Boušek, veterano de la movado. Li naskiĝis en 1884, estis kunfondinto de la Esperantista Klubo en Praha (1902), iniciatinto kaj komitatano de Bohema Asocio Esperantista (1908), kaj redaktis la revuojn "Bohema Esperantisto", Ĉeĥoslovaka Gazeto, kaj "Nova Eŭropo".

Pearson. Dum februaro mortis 72-jara Ethel M. Pearson en York, Anglujo, fidela esperantistino dum pli ol 50 jaroj.

Ribillard. La 16an de februaro mortis en Papeete, Tahitio, la konata aŭtoro Jean Ribillard, kies verkon "Vagado sub palmoj" eldonis UEA antaŭ kelkaj jaroj. Novan verkon li estis pretiganta por Stafeto. S-ano Ribillard estis iam oficiro de la franca armeo en Nordafriko, kaj estis ano de la esperantista Budhana Ligo.



47-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Kopenhago, 4-11 Aŭgusto 1962

Sub la Alta Protektado de la Dana Ĉefministro Viggo Kampmann.

Konstanta adreso: ĉe U.E.A., Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

OFICIALA KOMUNIKO

No. 7

Rotterdam, la 2-an de aprilo 1962

Prezroj Loĝiga Servo.

Pro bedaŭrinda preseraro la prezroj de la Loĝiga Servo, kiuj aperas en la Dua Oficiala Bulteno, **ne estas korektaj**. Bonvolu atenti, sekve, ke la ĝustaj prezroj estas la jenaj:

Kategorio A de 21 ĝis 35 n.gld.
(kun banĉambro) (40-65 d.kr.)
Kategorio B de 13 ĝis 21 n.gld.
(kun banĉambro) (25-40 d.kr.)
Kategorio C de 13 ĝis 21 n.gld.
(sen banĉambro) (25-40 d.kr.)
Kategorio D de 9,50 ĝis 13 n.gld.
(sen banĉambro) (18-25 d.kr.)
Kategorio E de 5,50 ĝis 9,50 n.gld.
(sen banĉambro) (10-18 d.kr.)

Fervojoj Rabatoj.

Kiel pli frue anoncite, la Dana Fervojo donas rabaton de 35% al kongresanoj aĉetantaj revenbileton. Krom ĝi ankaŭ la jenaj Fervojoj donas rabaton:

Sveda	35%
Norvega	25%
Hispana	25%
Hungara	25%
Franca	20%

Karavanoj. Anoncis karavanon:

S-ro Joel Vilkki, Somero, Finnlando;
Brita Esp.-Asocio, 140 Holland Park Avenue, London W. 11, Anglujo;
I.E.F., S-ro G. Grattapaglia, Via Pallanza 32, Torino, Italujo;
S-ro J. Telling, Schietbaanlaan 106 a, Rotterdam, Nederlando.

Geografia Semajno.

De 28/7 ĝis 4/8 okazos en Odense, Danlando, la 4-a Geografia Semajno. La kosto por plena restado dum 7 tagnoktoj estas 175 d.kr. Informojn kaj aligilojn donas: Roma kaj Poul Thorsen, Dyblandsvangen 7, Kopenhago-Brh., Danlando.

Internacia Prelegsemajno.

De la 11-a ĝis la 18-a de aŭgusto okazos en Frostavallen, Svedujo, Internacia Prelegsemajno. Detalajn informojn donas S-ro J. Strönne, Amiralsgatan 36, Malmö-C., Svedujo.

I.S.U.

La ĝenerala temo de la ĉijara Internacia Somera Universitato estas: "La lingva problemo en la scienco". Por prelegoj proponis sin:

Prof. D-ro I. Lapenna, "La lingva problemo en internaciaj rilatoj, en kompara kaj internacia juro";

S-ro C. Stöp-Bowitz, "Kiel nomi la organismojn?";

Prof. G. Waringhien, "La ellaborado de Esperanta leksikologio";

D-ro Paul Neergaard, "Problemoj de lingva unueco en la biologiaj kaj agronomiaj sciencoj";

Prof. D-ro Hideo Yagi, "Valoro de Esperanto por Internacia evoluo de medicino";

Prof. D-ro Ing. Zbigniew Nowak, "Provo de formulado de la esencaj leĝoj de l'mekaniko en Esperanto".

Statistiko (ĝis fino de marto):

Arabujo 1, Argentino 3, Aŭstralio 1, Aŭstrujo 6, Belgujo 15, Brazilo 4, Bri-

tujo 111, Bulgarujo 12, Danlando 185, Finnlando 38, Francujo 82, Germanujo 105, Grekujo 2, Hispanujo 8, Hungarujo 6, Irlando 1, Islando 2, Israelo 3, talujo 43, Japanujo 9, Jugoslavio 27, Kanado 1, Libano 1, Madagaskaro 1, Meksikio 3, Monako 2, Nederlando 83, Norvegujo 9, Nov-Zelando 1, Pollando 16, Portugalujo 7, Svedujo 126, Svisujo 15, Usono 14. Entute 943 el 34 landoj.

G. G. Pompilio

Konstanta Kongresa Sekretario

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

OFICIALA INFORMILO N-ro 346

DELEGITOJ

Argentino

Santa Fe (Santa Fe). 125.000.

D: S-ro H. J. Ceretti, fervoja inĝeniero (pensiita), Díaz Colodrero 2601 - Dep. 2.

Aŭstralio

Perth (Western Australia). 420.000.

VD: S-ino A. B. Sedgley, sekretario, 123 Gregory Street, Wembley, (W.A.)

Belgujo

Halle (Antwerpen). 2.000.

FD (Naturismo): S-ro C. De Cock, ekspedisto, Medelaar 1, Post Zandhoven.

Britujo

Queensbury (Yorkshire).

D: vakas.

Ĉeĥoslovakio

Martin (Slovakio).

D: vakas.

FD (Teatro amatora): vakas.

Perštejn n/O. (Ĉeĥy).

D: vakas.

Stonava (Morava). 5.000.

D: S-ro K. Zipser, barelisto kaj ĉarpentisto, n-ro 14 ĉe Karvina.

Danlando

Ejstrup station (Jylland).

D: vakas.

FD (Dentistaj aferoj): vakas.

Espergaerde (Sjaelland). 4.000.

D: S-ro B. W. Andersen, bibliotekisto, Kløvermarken 25.

FD (Biblioteko): la D.

Silkeborg (Jylland).

FD (Poŝto): vakas.

Finnlando

Helsinki-Munkkivuori (Uudenmaan lääni).

VD: vakas.

Helsinki.

JD: S-ro H. Laine, Linäker, Vartiokylä.

FD (Fervojoj): vakas.

FD (Oficistaj sindikatoj): vakas.

Imatra (Kymen Lääni). 30.000.

D: S-ro J. Kiviluoto, elektroteknikisto, Box 14, Vuoksenniska Koivurinne 3.

FD (Turismo): la D.

Kajaani (Oulun lääni).

D: vakas.

FD (Turismo): vakas.

Lappeenranta (Kymenlääni). 21.000.

FD (Fotografio): S-ino I. Miettinen, fotografistino, Suonionkatu 23 B 11.

Seinäjäki (Vaasanlääni). 15.000.

D: S-ro J. Röyskö, lokomotivestro, Rajakatu 93 B 20.

FD (Fervojoj): la D.

Tampere (Pispala, Hämenlääni). 130.000.

VD: S-ro N. Tumi, popollerneja instruisto, Pispalanharju 13.

FD (Instruado): la VD.

Turku 9. 130.000.

FD (Virinaj aferoj): S-ino A. Kavenius, Niklaksenk. 10/14 Turku 9.

Francujo

Asnières (Seine). 72.000.

FD (Fervojoj): F-ino G. Lemonnier, fervojistino, 17 rue Emile Agier.

Aubenas (Ardèche). 10.000.

D: S-ro P. Mayer, komerca direktoro, "La Vigie", chemin de Baza.

Lioux (Vaucluse). 320.

D: S-ro G. C. Gezequel, direktoro de Libertempa Centro, La Fraternité Spirituelle, Le Clos Fleuri.

FD (Naturismo): la D.

Lourdes (Hautes Pyrénées). 15.829.

D: S-ro A. Hasaers, komercisto, 72bis rue de la Grotte.

Montpellier (Hérault). 100.000.

FD (Kinematografio: amatora filmado): S-ro A. Capus, ŝtatoficisto, 15, rue des Frères Platter.

Paris (Seine). 2.850.000.

FD (Filatelio): S-ro J. A. Rousseau, oficestro en banko, 64 avenue de Châtillon, Paris 14e.

Paris.

FD (Geografio): S-ro G. Fournier, ŝtatoficisto por la telekomunikoj, 37 rue de Palestro, Paris 2e.

Saint-Jean-Deluz (Basses Pyrénées). 15.000.

D: S-ro J. Pelletier, komerca reprezentanto, Villa La Concha, rue de l'Infante.

FD (Turismo): la D.

Saint-Quentin (Aisne). 54.000.

D: S-ro E. Bidoit, profesoro pri matematiko, 21 rue Regnault.

Siaugues-St. 4 Romain (Haute Loire). 1.200.

D: S-ro P. Dehan, poŝtejestro.

FD (P.T.T.): la D.

Tain-L'Hermitage (Drôme). 5.000.

NIEUWE BINNENWEG 176

ROTTERDAM-2 - NEDERLANDO

D: S-ro P. Tournon, inĝeniero, Ponts et Chaussées.

Germanujo

Albisheim (6719) (Pfrimm), Rheinland-Pfalz). 1800.

D: S-ro R. Ritthaler, fervoja oficisto, Bahnhof.

FD (Fervojoj): la D.

FD (Turismo): la D.

Bad Dürkheim (6702) (Rheinland-Pfalz). 13.000.

D: F-ino H. Erhard, instruistino, Wasserhohl 41.

Bad Hersfeld (643) (Hessen). 24.000.

FD (Medicino): D-ro H. Künzel, kuracisto, Dudenstr. 8a.

Bad Kissingen (873) (Bayern). 16.000.

FD (Asekuro stat.): S-ro H. Röllinger, oficejestro, Frühlingstrasse 6a.

Bremen (28) 600.000.

FD (Turismo): S-ro K. Meyer, dipl. ing., Lindheimer Str. 28A, Osterholz.

Duisburg (41) (Nordrhein-Westfalen). 495.000.

D: S-ro T. W. Teich, librovendisto kaj lingvo-instruisto, Heerstr. 201.

FD (Esperantoinstruado): la D.

FD (Vegetarismo): la D.

Düsseldorf (4) (Nordrhein-Westfalen). 702.000.

D: S-ro K. A. Kaeser, industria komercisto, Herzogstr. 79.

Elmshorn (22) (Schleswig-Holstein). 35.700.

VD: F-ino I. Baumann, kontoristino, Panjestr. 14.

FD (Muelistaj aferoj): S-ro A. Balzar, muelistomajstro, Westerstrasse 20.

FD (Turismo): la D. FD (Muelistaj Aferoj).

Freiburg (78) (Breisgau).

FD (Naturismo): S-ro P. J. Hennefeld, b.Dr.Barne, Günterstal, Valentinstr. 8.

Gladenbach (3568) (Hessen). 5.000.

D: S-ro L. Bechtold, forstoficisto, Hess. Forstamt.

FD (Forsto kaj Ĉasado): la D.

Grafenau (8352) (Bayern). 2.500.

D: S-ro M. Wiesmann, fervoja oficisto, Gunterstrasse 2.

Hamburg (2) 1.800.000.

D: S-ro H. Wielgus, policisto, Elise-Averdieck-Str. 34.

FD (Studentaj aferoj): S-ro F. Kunze,

studento, Keplerstr. 33 II, Altona.
Moenchengladbach (405) (Nordrhein). 130.000.

D : S-ro H. D. Goeres, studento, Viersener Strasse 255.

München (8) Bayern). 1.100.000.

FD (Tekniko) : S-ro H. Spirat, maŝinkonstruisto, Attenkoferstr. 55.

Neu-Isenburg (6078) (Hessen). 25.000.

D : S-ro E. Geis, diplomita komercisto, Neckarstr. 28.

Oberkirch (7609) (Baden). 8.000.

FD (Filatelo) : S-ro H. Heiss, industria komercisto, Hoellmattstr. 34.

Regensburg (24) (Bayern). 140.000.

JD : S-ro Stefan Maul, studento, Bismarckplatz 2, Regensburg 2.

FD (Religio (katol.) : la JD.

Remscheid (Nordrhein/Westfalen).

FD (Frizistaj aferoj) : vakas.

Solingen (565) (Nordrhein/Westfalen). 175.000.

FD (Fervojoj) : S-ro W. Grass, fervoja oficisto, Sol.-Ohligs, Tunnelstrasse 31.

FD (Filatelo) : la FD (Fervojoj).

Tailfingen (7477) (Württemberg). 15.000.

JD : F-ino U. Herbst, kontoristino, Lerchenstr. 24, Kr. Balingen.

Wiesbaden (62) (Hessen). 253.000.

JD : S-ro Dieter Kleemann, studento, Fritz-Kalle-Str. 26.

Hungarujo

Oroszlány (Komárom-Megye). 25.000.

D : S-ro D. Zánkai, kemia fakloboristo, Dadi-ut 9.52.III.15.

Japanujo

Tokusima (Tokusima-ken). 180.000.

D : S-ro T. Deguči, komercisto, Saiūaiĉjo 2.

Jugoslavio

Beograd (Serbio). 800.000.

FD (Sporto-Gimnastiko) : S-ro S. Milojević, studento, Paviljon 21/II st. 24, Novi Beograd.

Zagreb (Hrvatska).

FD (Psikologio) : vakas.

Katerio

Doha (Qatar). 50.000.

FD (Naturismo) : S-ro N. Isaac, revizoro, P.O. Box 111.

Meksikio

Guadalajara (Jalisco). 800.000.

D : S-ro A. Gómez Cruz, komercisto, Apartado 664.

Nederlando

Krommenie (N.H.). 10.000.

D : S-ino J. A. v. d. Meulen-van Harten, Popelstraat 13.

Norvegujo

Bergen. 115.000.

FD (Turismo) : S-ro K. Offerdal, revizoro, M. Mjeldes vei 2, Melkeplassen.

Frederikstad (Østfold). 15.000.

S-ro T. Andersen, fak-instruisto, forĝado, Rislökka 6, Glemmen.

Larvik (Vestfold). 10.500.

D : S-ro W. Hortman, fervojisto, Hoff's Gate 37c.

FD (Fervojoj) : la D.

Løten (Hedmark). 6.000.

D : S-ro P. J. Krogstie, fervojoficisto.

Skorovatn (N. Trøndelag). 600.

D : S-ino S. Kloūmann, Tel : Namsskogan 41 et 10.

Polinezio Franca

Papeete (Tahiti).

D : vakas.

FD (Budhismo) : vakas.

Pollando

Gdańsk (Pomeranio).

FD (Muziko) : S-ro J. Ujazdowski, muzika redaktoro en "Pola Radio", Gdańsk-Wrzeszcz, ul. Danusi 4c m.16.

Gdynia (woj. Gdańsk). 165.000.

D : S-ro E. Nawrowski, fervojoficisto, ul. Hetmańska 20.

FD (Fervojoj) : la D.

Sovet-Unio

Ĉelabinsk (Rossijskaja FSSR). 612.000.

D : S-ro B. F. Sokolov, sciencisto, Puškina 60, kv. 8.

Dnepropetrovsk (Ukrainskaja SSR). 600.000.

D : S-ro V. P. Pimenov, pensiulo, Oktjabrskaja ploŝĉadj 6/11, Dnepropetrovsk 27.

Irkutsk (Rossijskaja FSSR).

D : S-ro S. V. Filippov, pensiulo, ul. Furje 13, kv. 2, Irkutsk 3.

Ivanovo (Rossijskaja FSSR). 336.000.

D : S-ro N. I. Ŝumarin, pensiulo, prospekt Lenina 102, podjezd 15, kv. 115.

Krasnodar (Rossijskaja FSSR). 312.000.

D : S-ro V. T. Najdin, pensiulo, Paŝkovka, ul. Krasnaja 105.

Krivoj Rog (Ukrainskaja SSR). 475.000.

D : D-ro Z. V. Korn, Kaliningradskaja 6, kv. 27.

Rapla Rajoon (Estonia SSR). 48.000.

D : S-ro L. Klaos, elektroteknikisto, Salutaguse Pärmitahas.

Torva (Estonia SSR). 2.000.

D : S-ro L. Tangsoo, librotenisto, Männiku 14.

Volgograd (Rossijskaja FSSR). 800.000.

D : S-ro I. E. Dragunovskij, elektroveldisto, ul. Rjaĵskaja 13, Volgograd 10.

Svedujo

Karlskrona (Blekinge).

VD : vakas.

FD (Vegetarismo) : vakas.

Limhamn (Skåne).

FD (Maristaj aferoj) : vakas.

Säffle (Värmland).

FD (Presado) : vakas.

Umeå (Västerbotten).

VD : vakas.

Uppsala (Uppland). 80.000.

D : S-ro K. Rehnström, studanto, Tuna Backar 17 B n.b.

Svislando

Baden (Aargau). 16.000.

D : S-ro P. Bächli, dipl. asekuragento, Ehrendingerstr. 58. Ennetbaden.

FD (Asekuro) : la D.

Basel.

D : vakas.

Riehen (Basel). 15.000.

D : S-ro K. Schweizer, instruisto, In den Neumatten 51.

Usono

Bloomfield (New Jersey). 30.000.

FD (Skoltismo) : S-ro C. S. Otto, farbovendisto, 32 Hazelwood Road.

Chicago (Illinois). 4.000.000.

FD (Turismo aeroplana) : S-ro R. Runser, aerlinio-piloto, 322 Miller Ct. Glen Ellyn.

Gallup (New Mexico). 14.000.

D : F-ino R. U. Orloff, oficistino, 504 North Fifth Street.

FD (Etnografio, nordamer. indiĝenoj) : la D.

Glen Ellyn (Illinois). 16.000.

D : S-ro R. Runser, komerca piloto aviada, 322 Miller Ct.

Greenfield (Mass.). 18.000.

D : S-ro W. H. Gould, hejtisto kaj instruisto, 114 Deerfield Street.

Hollywood.

VD : vakas.

Los Angeles (California).

VD : S-ro E. Kalmar, inĝeniero, 625 N. Harper, Los Ang. 48.

Meadville (Pennsylvania). 19.000.

JD : F-ino M. Fisher, help-flegistino, 808 Stewart St.

Monticello (New York). 5000.

S-ro A. H. Okun, arkitekto, inĝeniero kaj pentristo, 162 Broadway.

Pacific Palisades (California). 40.000.

VD : S-ino Z. e. Klawiter, 16156 Alci-ma Avenue.

FD (Filatelo) : la VD.

FD (Hortikulturo) : la VD.

Pittsburgh (Pennsylvania). 700.000.

D : S-ro B. Owens, kalkulisto, Box 260 RD 1, Venetia, Tel : WI-1-8576.

FD (Industria Trafiko) : S-ro D. McClellan, 33 Macassar Drive, Pittsb. 36. Tel : OL 5-7704.

Redondo Beach (California). 50.000.

D : D-rino M. Hornbeck, direktorino de edukejo, Recorded Learning Center, 1722 Esplanade 4. Tel : 375-6208. FD (Endormterapio) : la D.

Redwood City (California). 40.000.

D : S-ro R. Daetz, gimnazia instruisto, 3591 Altamont Way. Tel : EMerson 6-6556.

ED. (Edukado) : la D.

Santa Monica (California). 100.000.

FD (Komerco eksterlanda) : S-ino B. Parker, analizisto de vendejaj lokoj, 515 - 25th St. Tel : EXbrook 48691.

Springfield (Massachusetts). 180.000.

D : S-ro S. Beverley, agento de vojaĝoj, 265 State Street, Springfield 3. Tel. RE6-3454 aŭ RE4-0288.

FD (Turismo) : la D.

Taunton (Massachusetts). 40.000.

D : S-ro K. Porespo, librotenisto, 3 Dighton Ave. Tel : VA-4-6063.

Washington (District of Columbia). 783.000.

FD (Ĵurnalismo) : S-ro R. L. Davis, ĵurnalisto, 409 6 th St. S.E., Washington 3. Tel : 547-8126.

Venezuelo

Barquisimeto (Lara). 200.000.

D : S-ro I. Nunez Beltram, librovendisto, Carrera 22 Nro 14- 55 (Apartado 250).

FD (Ruĝa Kruco) : la D.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Bonfim, S-ro A. da Cruz, Erasilia, Brazilo.

Coupeau, S-ro R., Le Mans, Francujo.
Melo, S-ro A., Goiania, Brazilo

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1962

222. Vaz, S-ro A. J., Rio de Janeiro, Brazilo; 223. Beamont, S-ro B. B., Fartown; 224. Howell, F-ino B., Cromhall; 225. Hanson, S-ro C. G., Teighmouth; 226. Thornber, S-ro J. C., Accrington; 227. Williams, S-ro N., Manchester, Britujo; 228. Lange, S-ro O. C., Hvidovre; 229. Pedersen, S-ro J., Kolding; 230. Weile, S-ro K., Vedbaek, Danlando; 231. Ihander, F-ino O. M., Pietarsaari; 232. Narvala, S-ro N. G., K  p  l  ; 233. Vuolo, S-ro L., Suomusj  rvi, Finnlando; 234. Beau, S-ro J., Marseille; 235. Beliard, S-ro L., Nantes; 236. Delahaye, S-ro I., Petitville; 237. Knecht, S-ro F. P., Strasbourg-Entzheim; 238. Lemonnier, F-ino G., Asni  res; 239. Peche, F-ino P., Reims; 240. Philippe, S-ro H., Arras, Francujo; 241. B  cker, S-ro H., Gelsenkirchen; 242. Epstein, S-ro F., Hamburg; 243. Kind, S-ro E., Stotzheim; 244. Kraft, S-ro T., Schw  bisch Gm  nd; 245. Lamprecht, D-ro H., Essen; 246. Michalik, S-ino F., H  sel; 247. Michling, S-ro Ing. H., G  ttingen; 248. Sandrock, S-ro O., Essen; 249. Volk, S-ro F., W  rzburg; 250. Wingen, S-ro W., K  ln-S  lz; 251. Wolff, S-ro J., K  ln; 252. Wuenschel, S-ro H. Ph., M  nchen, Germanujo; 253. Prez. de Esp.-Klubo "Nordo" de Educacion y Descanso, Oviedo, Hispanujo; 254. Bl  ndal, S-ro B. P., Hvammstanga, Islando; 255. Campetti, Prof. D-ro G., Lucca; 256. Dazzini, Prof-ino G. G., Massa; 257. Minnaia, S-ro L., Roma; 258. Vaona, S-ro D-ro A., Torino, Italujo; 259. Archell, S-ro R. S., Ville Lasalle; 260. Maier-Bevel, S-ino A. L., Galiano Island, Kanado; 261. Holleman, S-ro J. V., Groningen; 262. Prins, Prof. J., Utrecht, Nederlando; 263. Clarkson, S-ro R. J., Tauranga, Nov-Zelando; 264. Andersson, S-ro L., H  je; 265. Ekbom, F-ino A., Boden; 266. Enstr  m, F-ino M. L., Johannes-hov; 267. Ericson, S-ro   ., Sk  ldinge; 268. Eriksson, S-ro A., Ramvik; 269. Fejde, S-ro M., N  ssj  ; 270. Frode, S-ro O., G  teborg; 271. Gerdman, S-ro B., Stockholm; 272. Gustafson, S-ro N., H  llabrottet; 273. H  kansson, S-ro H., Tr  ryd; 274. Jensie, S-ino M., J  nk  ping; 276. Lindberg, S-ro F.,   m  l; 277. Mellberg, F-ino G., Varberg; 278. Rytenberg, Ing. E., Uppsala; 279. Sedendahl, S-ro Civiling. B.,   kersberga; 280. S  j  berg, S-ro H., Gnosj  ; 281. S  derberg, S-ro K., Uppsala; 282. S  derlund, S-ro B., Kumla; 283. Stenstr  m, F-ino S., Broddarp, Svedujo; 284. Giannini, S-ro W., Zollikerberg, Svislando; 285. Gerber, S-ro Wm., Twin Falls; 286. Hoffman, S-ro D. W., Jersey City; 287. Lieberman, D-ro E. J.,

Brookline; 288. Orloff, F-ino R. U., Gallup; 289. Neri, S-ro R. R., Stafford Springs, Usono.

290. Harry, S-ro R., Forrest Canberra, 291. Kosutek, S-ro J., Sydney, 292. Prewett, S-ro J. N., Rochester, A  stralio; 293. Boffejon, S-ro H., Brasschaat, 294. De Boes, S-ro G., Gent, 295. Degryse, S-ro A., Roeselare, 296. Geers, F-ino B., Antwerpen, 297. Kestens, F-ino M., Bruxelles, 298. Staes, S-ino E., Bruxelles, Belgujo; 299. Ara  jo, S-ro G. S. de, Rio de Janeiro, 300. Farias, S-ro B. F., Feira de Santana, 301. Flores, Ing. A., Volta Redonda, 302. Pauluk, S-ro J., Londra, 303. Peixoto, S-ro O., Niteroi, 304. Silva, P. V. da, Brasilia, 305. Verde, D-ro D. Lima, Limoeiro do Norte, 306. Wehrs, F-ino E., Niteroj, Brazilo; 307. Aitchison, S-ro G. R., Northampton, 308. Atkinson, S-ro W. G., Worcester Park, 309. Challinger, S-ro J. K., Leeds, 310. Crabtree, S-ro E. P., Huddersfield, 311. Eldon, S-ro H. B., Southport, 312. Grocott, S-ro J. R., Blackburn, 313. Hockey, F-ino M. J., Barrow-in-Furness, 314. Ingham, S-ro H., Liverpool, 315. Knight, S-ino E. B., London, 316. Jackson Laurie, S-ro E., Bournemouth, 317. Laurie, S-ino W., Bournemouth, 318. Leather, S-ro A. J., Blackburn, 319. Pearson, F-ino E. M., York, 320. Pilling, S-ino F. K., Blackpool, 321. Pilling, F-ino F., Poulton-le-Fylde, 322. Seddon, S-ino R., Southport, 323. Shaw, S-ro F. W., Wistaston, 324. Sly, S-ro K. A., Letchworth, 325. Squire, F-ino E., West Hartlepool, Britujo; 326. Cifudov, S-ro P., Sofia, Bulgario;

FONDAJO DOMO

S-ro A. Masuhr, Germanujo 3.— gld.; S-ro Iranzo, Hispanujo, 50.— gld., S-ino M. J. Dijkhoff-Lenze, Nederlando, 50.— gld., S-ro J. Vilkki, Finnlando, 100.— gld., Esp.-Grupo Munkeno, Germanujo, 45.— gld., S-ro Svarstad, Calif., Usono, 50.— gld., S-ro H. Lachmund, Germanujo, 50.— gld., F-ino P. Oosthoek, Nederlando, 50.— gld., S-ro J. J. Sturzenegger, Svisujo, 50.— gld., S.B.E.T., Britujo, 50.— gld., S-ro E. Kull, Svedujo, 51,39 gld.

  iuj nomoj estas enskribitaj en la "Ora Libro pri la Domo". Malavare donacu por la propra sidejo de la Asocio !

FONDAJO PROF. CANUTO

Anta  a stato : 250 MA, 32 MJ, 7 J-MJ kaj 1 J-MA.

S-ro M. Bourgeois, Madagaskaro 1 MA; S-ino H. Bouman, Nederlando, 1 MJ.

Entute : 251 MA, 33 MJ, 7 J-MJ kaj 1 J-MA.

  iuj kontribuu por membrigi esperantistojn en nepagipovaj landoj, honoro al la nobla prezidinto de U.E.A. (Vidu dec. no. "Esperanto", 1960).

FONDAJO ZAMENHOF

Anta  a sumo : 18.734,07 gld.

S-ro F. Nawratil, A  strujo, 1,65 gld.;

S-ro F. Lowitzer, Germanujo, 1,80 gld.

Entute : 18.737, 52 gld.

Da  rigu vian kontribuadon por subteni la plian agadon de la Asocio, por firmigi la poziciojn akiritajn dum la Zamenhof-Jaro !

DONACOJ AL. A.P.O.

S-ro H. B. A., Nederlando, 100.— gld.

DONACOJ AL ĜENERALA KASO

S-ro Th. Thorsteinsson, Islando, 1,65 gld.; S-ro A. M. Brya, 111. Usono, 11,70 gld.; S-ro J. H. Murray, Usono, 17,95 gld.

Al   iuj donacintoj tre koran dankon.

M. H. Vermaas,
Direktoro C.O.

ANONCETOJ

Por helpi disvastigi nian lingvon, sendu infandesegnaĵojn al la peranto de Migranta Ekspozicio — S-ro J. Montfort, Apartado 19.003, Barcelona, Hispanujo.

Grava hispana revuo pri modernaj konstruaĵoj deziras akiri fotojn kaj artikolojn pri nova arkitekturo. Rekompencos la  dezire. Respondo garantiata. S-ro Johano Farr   Sierra, Ronda General Mitre. 107, Barcelona 6, Hispanujo.

Nova metodo por varbado. Konvinka rezonado. 5 rpk. "Esperanto". Lund, pf. 212, Svedujo.

Tutjara Kongreso !   u ne eble ? Povos esti unua pa  o al vera Esperanto-Civito. Respondu publike per propra anonceto (kio cetere helpas al U.E.A.) a   letere al D. Soleo, 14b Castle Avenue, Dover, Britujo, mendante 15-paĝan bro  uron kontra   2 respond-kuponoj a   egalvaloro.

Popoldancojn kaj -kantojn el la tuta mondo deziras S-ro Juho Pyyk  nen, Ilmarisenkatu 6, Lauritsala, Finnlando.

Julio Smildzin  s, 21-jara latva studento deziras korespondi, ricevi esperantaĵojn, dancmuziknotojn, PM pri Esperanto. Rekompenco la   dezire. Respondo garantiata. USSR, Latvio, Riga 2, str. D  liju 14.

18-jarulo, Jan Milld, Grimstagatan 35, V  llingby, Svedujo, deziras korespondi. Respondo garantiata.

Filatelistoj ! Nova filatelistklubo dez. inter  anĝi po  tmarkojn : skandinaviajn kontra   la ceteraj e  ropaj la  kvante a   la   katalogo "Michel". Bonvolu afranki per memormarkoj. Johs. Christoffersen, Rosenvangs All   20, Aarhus, Danlando.

Deziras inter  anĝi po  tmarkojn kun   iuj landoj Alfred Mayer, Zeppelinstrasse 35, 75 Karlsruhe, Germanujo.

Juna Anglo, 27-jara, volas korespondi kun Hungaro kiu interesiĝas pri filatelo. Walker, 23, Queen's Gardens, Hornsea, Jork  iro, Anglujo.

Ekspozicion organizigas junaj esperantistoj julie. Sendu bildkartojn ktp. Nepre respondos. A. R. Cartwright, City of Norwich School, Eaton Road, Norwich, Nor 48D, Anglujo.

DEKLAROJ de S-roj NORMAN R. SMITH kaj J. RÉGULO PÉREZ

En mia artikolo "NEŬTRALECO" en la marta numero de ESPERANTO mi, je la sesa paragrafo aludis al "perfiduloj". Tiu frazo rilatas al tiaj proponoj por nova lingvo, kiuj sin kaŝas malantaŭ la nomo Esperanto, Ne estis mia intenco, ke oni komprenu tiun vorton kiel rilata al la sekvanta frazo "Eĉ pli danĝeraj.... ol la Zamenhofa". Tiu frazo staras sendepende kaj ĝuste ĉar la protagonistoj ne konstatas, ke ili atakas la fundamenton, la danĝero estas des pli granda.

Plue, la artikolo esprimas la personan opinion de la subskribinto kaj neniel reprezentas la opinion de iu alia persono nek de iu organizaĵo.

Norman R. Smith

Informita de la Ĝenerala Sekretario, ke la Estraro de UEA ricevis tri plendojn pro iu esprimo en la intervjuo, kiun S-ro Thorsen faris al mi kaj kiu aperis en la aprila kajero de "Esperanto" (p. 63, 14a linio de supre), mi rapidas deklari, ke se en la formo de tiu intervjuo troviĝas io persone ofenda por kelkaj esperantistoj, mi tion vere tre bedaŭras, ĉar en miaj parolaj respondoj al S-ro Thorsen mi ja celis nur kontraŭi **ideojn** kaj neniel intencis ataki **personojn**; sekve mi reprenas la koncernajn vortojn kaj petas pardonon pro tiu kontraŭvola forma misaĵo.

J. Régulo

PACO SUR LA TERO KONSERVADO DE LA VIVO

Partoprenontoj de la "47a" en Kopenhago kaj aliaj personoj sin interesigantaj pri PACO SUR LA TERO kaj KONSERVADO DE LA VIVO (realigeblaj) povas sin turni al:

Gunnar Rugland

Dumkongresa adreso: Hotel Nebo, Instedgade 6-8, Köbenhavn V (proksime de Hovedbanegården (la centra stacidomo)).

Hejmo adreso: ĉe Rönnell, Hornsgatan 89 II, Stockholm Sv., Svedujo.

BENELUKSA KONGRESO

en floriĉa Nederlando!

HAGO, Pentekoste 1962

Riĉa programo, belega konferencejo, ĝuindaj ekskursoj, malaltaj prezoj.

Petu informojn ĉe: S-ino I. J. M. Dijkhoff, van Trigtstraat 20, DEN HAAG, Nederlando.

NATURISTA ESPERANTO-REVUO ILUSTRITA

nun akirebla!

La nova ilustrita eldonaĵo "Naturista Vivo" estas **senpage** sendata el membroj de INFE (Internacia Naturista Fakgrupo Esperantista). Krome, membroj ricevas membrokartojn kaj rajtas senpage anonci en "Naturista Vivo".

Dumviva membreco en INFE (**inkluzive dumvivan ricevadon de "Naturista Vivo"**) kostas NUN nur 75 Stelojn por familio aŭ sola viro; 38 Stelojn por sola virino. La egalvaloro de la kotizo estas pagebla ankaŭ per monbiletoj de iu ajn lando, per poŝtmandato, bankĉeko, int. rpk, k.a.

Vi nenion pli pagos. Sed estas via lasta ŝanco! Ekde la I-a de julio 1962 la kotizoj plialtiĝos.

ŜPARU MONON - AGU TUJ!!!

"Naturista Vivo", Leif Heilberg, 1801 Page St., San Francisco 17, Calif. USONO.

TENERIFE

Ĉu vi ŝatus posedi dometon sur la rava insulo en Atlantiko?

Ni konstruos laŭ via gusto! Internacia atmosfero!
Ĉiama printempo!

Nenia hejtproblemo! Nenia atomtimo!
Belegaj terenpecoj kun panorama rigardo, en Puerto, disponeblaj.

Petu informojn de **N-ro 200, gazeto ESPERANTO**,
Nwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, NEDERLANDO

INFANA FERIOSEMAJNO EN SVEDUJO

La esperantaj kluboj en Gotenburgo aranĝas ĉijare renkontiĝon por esperantoparolantaj infanoj dum la tempo 11—17 aŭgusto. La supra aĝlimo estas 14 jaroj kaj la restado estos senkosta (escepte iomete da mono por diversaj ekskursoj). Por pluaj informoj skribu al S-ino Märtha Andréasson, Lilla Tolsered, **Hisings Kärra**, Svedujo, kiel eble plej baldaŭ.

"LA VERDA RAKETO" de Jean Forge estis entuziasme akceptita de publiko kaj kritiko. Se ankaŭ vi deziras legi furoran satiran verkon, ekzempleroj ankoraŭ estas haveblaj. La prezo estas nur 15.- d. kr.

"LA MARVIRINETO" de Hans Christian Andersen, la mondfama dana fabelisto, aperos esperantlingve okaze de la 47-a U.K. en lukse kolorilustrita eldono. Posedenda verko havebla dum la kongreso aŭ rekte ĉe la eldonejo. La prezo de tiu brile aspektanta libro estos 15.- d.kr.

ELDONEJO KOKO

Randbølvej 4, Kopenhago F,
Danlando. - Ĝiro: 9 62 89

Helsingör

loko de la Antaŭkongreso 29/7 — 4/8 kaj de la FERIAJ KURSOJ. Prelegoj, distrado kaj ekskursoj. La internacia Altlernejo estas la antaŭkongresejo. Senpage ni sendos al vi nian programon kaj invitas vin plej kore.

L. Friis,
Ingemannsvej 9,
Aabyhøj, Danlando.

RAPIDU MENDI

la novan kajeron de

BELARTO

Elstaraj originalaj kaj tradukaj literaturaĵoj: rakontoj, artikoloj, eseoj, poemoj.

Riĉe ilustrita

Kontribuoj de novaj kaj malnovaj talentoj.

68 paĝoj.

Prezo: 3,50 gld.

N.B. Por individuaj membroj de U.E.A. nur 3.- gld.

Mendu ĝin ĉe U.E.A., Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

INFANOJ NE KONAS LIMOJN

Belega fotolibro kun teksto en Esperanto.
Eldonis **BRUNA**, Nederlando.

Sur kvin kontinentoj infanoj estas ĉarmegaj en siaj ĝojoj, ĉagreno, ludo kaj laboro
Konvinkiĝu mem!

Prezo:
2,95 gld.
(11.80 steloj)

**MENDU ĈE
U.E.A.**

